# der esperantist

**Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR**

22. Jahrgang Nr. 140 (6/1986) ISSN 001 4-0619 30 Pf


## Pri specifaĵoj de la Esperanto-movado en kelkaj eŭropaj socialismaj landoj *)

0. Pro spaco-limigo ne eblas trakti la temon tiom funde kiom necesus. Koncizigoj kaj resumoj havas la danĝeron de idealigoj kaj de miskomprenoj. Ne eblas sufiĉe diferencite reliefigi kontraŭdirojn, problemojn aŭ malfermajn demandojn. Krome, mi prezentas ĉi-tie mian tute personan vidpunkton.

1. La Esperanto-movado naskiĝis esence kiel eŭropa fenomeno kaj ankaŭ nuntempe havas siajn plej fortajn radikojn sur la malnova kontinento. Ĉar, tamen, laŭ sia destino la lingvo fariĝu tutmonda, necesus pli paroli pri la ekstereŭropa movado. Kaj feliĉe ĉiam pli kaj pli venas fortaj impulsoj kaj originalaj kontribuoj el neeŭropaj landoj, inter ili aparte el Ĉinio kaj Japanio.
Mi tamen prezentu informojn kaj vidpunktojn pri la profilo de la Esperanta aktivado en eŭropa landa grupo, kie la Internacia Lingvo havas aparte fortan pozicion: Temas pri Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, BEA), Ĉeĥoslovakio (Ĉeĥa Esperanto-Asocio, ĈEA; Slovakia Esperanto-Asocio, SEA), Germana Demokratia Respubliko (Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, GDREA), Hungario (Hungara Esperanto-Asocio, HEA), Pollando (Pola Esperanto-Asocio, PEA), Soveta Unio (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, ASE).

Ni konsciu, ke la situacio de la internacia Esperanto-movado esence dependas de la internacia politika klimato, aparte de la rilatoj inter la du ĉefaj malsamsistemaj ŝtatoj grupiĝoj. La malstreĉiga proceso de Helsinki, kvankam dum lastaj jaroj konsiderinde malrapidigita, donis al la evoluo de la Esperanto-movado gravegajn impulsojn, kiuj efikadas pozitive ĝis la nuntempo.
Krome, la konkreta pozicio de Esperanto en unuopaj landoj dependas de tuta aro da **objektivaj faktoroj**, kiuj sin reciproke kompletigas aŭ ekskludas kaj ne nepre efikadas samtempe. Al ili aparatenas i. a. a) la politika sistemo de la ŝtato, b) la ekonomiaj kondiĉoj, c) la internacia pozicio de la ŝtato, d) la evoluo-nivelo de la tuta socio, laŭ klereco kaj vivnivelo, e) la lingva situacio kaj lingva politiko interne de la lando, f) la lingvopolitiko en internaciaj rilatoj, g) historiaj tradicioj, h) etnaj specifaĵoj k. a. Krome, kompreneble, ankaŭ **subjektivaj faktoroj** povas ludi relative gravan rolon, ekz. a) antaŭjuĝoj resp. pozitiva sinteno de gravaj politikistoj kaj sociaj eminentuloj pri la lingva problemo ĝenerale kaj aparte pri Esperanto, b) manko aŭ ekzisto de seriozaj kursgvidantoj, science trejnitaj homoj, lertaj propagandistoj kaj aliaj aktivuloj k.s.

2. Kvankam la menciitaj objektivaj kaj subjektivaj faktoroj en la menciitaj socialismaj landoj ne efikadas tute unuece sed ofte iom diferencige — foje regresige, foje impete progresige, ne malofte kontraŭdire — eblas tamen elstarigi kelkajn relative **komunajn trajtojn:**

2.1. La Esperanto-organizaĵoj de la menciitaj landoj ne funkcias izolite de la socia vivo sed estas integra parto de ĝi. Ekzistaj fruktodonaj ligoj al prestiĝaj naciaj organizaĵoj (ni nur mencias kelkajn), ekz. en **Bulgario** al la

Nacia Fronto (= tegmenta organiza formo de la partioj kaj plej gravaj amasaj organizaĵoj), en **ČSSR** al la sindikataj grupoj en uzinoj kaj la packonsilantaroj, en **Huagario** al la sindikatoj kaj la packonsilantaro, en **Pollando** al la kultura ministerio kaj Pola Studenta Unuiĝo, en **GDR** al la kultura amasorganizaĵo Kulturligo, en **Soveta Unio** al la Unio de la societoj por kulturaj rilatoj kaj amikeco kun eksterlando, krome al la sindikato kaj junulara organizaĵo.

2.2. La Esperanto-movado prezentas specifan internaciecan kulturpolitikan aktivadon, kiu estas karakterizita per multflankeco kaj originaleco. Pro tio ĝi plej ofte estas pozitive akceptata socia partnero, kvankam ja ekzistas grandaj niveldiferencoj laŭ agadkampoj, konkretaj landoj, regionoj kaj lokoj.

Konsiderante certan labordividon inter la landoj kaj la tre intiman kunlaboron, la specifaj fortecoj (respektive malfortecoj) de unu lando en aparta agadokampo certagrade egaliĝas en alia. Pro tio certagrade la tuta menciita regiono profitas i. a. de jenaj aktivaĵoj:

2.2.1. Kulturaj, politikaj kaj movadaj publicaĵoj en Esperanto abundas. Nur sole en Hungario dum la lastaj 10 jaroj aperis pli ol 100 titoloj. En Soveta Unio aperas daŭre aktualaj politikaj dokumentoj kaj estas sinkronizitaj kelkaj informfilmoj. De 139 periodaĵoj, listigitaj en la katalogo de la libroservo de UEA 1984/85 22 aperas en 5 landoj, t. e. 16 %. La plej multajn eldonas Hungario kaj Bulgario. Tiu ĉi materialo ludas gravan rolon por la internacia kulturpontiga rolo de Esperanto, alte taksata de UNESKO, kaj kontribuas al la pliriĉiĝo kaj evoluo de la lingvo kaj tiel al ĝia uzebleco kaj stabileco.

2.2.2. La saman rolon ankaŭ ludas la rilate al Esperanto tutmonde plej aktiva radio-stacio, Radio Polonia. La 23an de julio 1986 ĝi emisiis la 30 000-an disaŭdigon. Grandega kvanto da parolita Esperanto, grava ankaŭ i. a. pro la evoluiga, aktualiga kaj prononcnormiga influo de la disaŭdigoj je la lingvo mem.

2.2.3. Aparte gravan rolon ludas en la menciita regiono la turismo per Esperanto.
La „turisma esperanto-kalendaro" eldonita de Monda Turismo 1986 en Bydgoszcz (Pollando) registras 367 diversspecajn internaciajn turismajn, kulturajn kaj klerigajn aranĝojn en 26 landoj. Nur en Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario kaj Pollando, do en 5 landoj, okazas 241 (kompreneble malsamnivelaj) internaciaj aranĝoj, do 65 %.

2.2.4. Abundas teatraj grupoj, korusoj, pupteatroj kaj aliaj kulturaj iniciatoj, kiuj ankaŭ internacie, ekz. dum Universalaj Kongresoj, prezentas sian arton.

2.2.5. En Bulgario, Hungario kaj Pollando la instruado de Esperanto, parte laŭ ŝtataj instruplanoj, kaj la edukado kaj kvalifikado de la instruantoj, en tutmonda skalo estas plej progresinta. En Bulgario kaj Hungario en multaj lernejoj Esperanto estas la tria libere elektebla fremda lingvo. En Budapeŝto en la ŝtata universitato ekzistas la ebleco oficiale diplomiĝi kiel plenrajta instruisto de Esperanto por gimnazioj.

2.2.6. Ne laste menciindas la certa apliko de Esperanto por fakaj celoj, ĉu komputado, medicino, agrikulturo, fervojismo, filologio k. a. Apartan rolon ĉi-rilate ludas Hungario. Impulsoj por levi la kreadon de fakterminoj je pli altan nivelon lastatempe venas el GDR.

2.2.7. En Hungario, Soveta Unio kaj GDR laboras oficialaj aŭ duonoficialaj instancoj pri la sciencaj aspektoj de la internacia lingva komunikado kaj pri Esperanto eldonante verkojn pri interlingvistiko kaj esperantologio.

2.3. Pro tiuj aktivecoj kaj por certigi ilin la Esperanto-organizaĵoj en la 6 landoj — kvankam kun diferencoj — ricevas konsiderindan moralan kaj materian ŝtatan subtenon, ĉu rekte per ŝtataj instancoj aŭ pere de amasaj organizaĵoj.

2.4. La priskribita situacio permesas el ĉiuj menciitaj 7 asocioj posedi proprajn oficejojn kun profesia oficistaro, en kelkaj asocioj inter 10 aŭ eĉ 25

plentempe pagitaj personoj, en tuta Bulgario eble eĉ 60. Aparta atingo estas la tutjare funkcianta „Internacia Esperanto-Lernejo" en Pisanica ĉe la bulgara urbo Smoljan. La moderna domo kun pli ol 200 litoj estas proprajo de Bulgara Esperanto-Asocio.

2.5. Verŝajne ĝenerale ne eblas paroli pri amaseco rilate al la Esperanto-movado. Tamen, en la kadro de la propraj limoj de la movado, certan amasecon atingis la soveta kun 10 000, la pola kun 8 000, la bulgara kaj hungara organizaĵoj kun po 6 000 membroj. Se oni aldonas la 2 000 membrojn de la ĉeha, 3 000 de la slovaka asocioj kaj 1 700 de GDREA, oni havas preskaŭ 37 000 organizitajn esperantistojn nur en la 6 socialismaj landoj. La plej amasaj Universalaj Kongresoj post la dua mondmilito, kun 3 000 ĝis 5 000 partoprenintoj okazis 1959 en Varsovio (3 256), 1963 en Sofio (3 472), 1966 en Budapest (3 975), 1978 en Varna (4 414) kaj denove 1983 en Budapest (4 834).

2.6. Grava faktoro por la multflanka funkciado kaj plua kvanta kaj kvalita kreskado de la Esperanto-movado en la eŭropaj socialismaj landoj estas sendube la relativa intensa kunlaboro de la asocioj. Diversebenoj amikeckontraktoj, oftaj kontaktoj inter la membroj kaj la regulaj konsultiĝoj de la ĉefaj funkciuloj de la asocioj plifaciligas ĉi-tiun kunlaboron. La jam tradicia sistemo de ĉiujaraj konsultiĝoj — la 19a okazis dum aprilo 1986 en Poprad (Ĉeĥoslovakio) — estas intensa spertinterŝanĝo por pli bone fruktuzi la menciitajn komunajn kaj diferencajn trajtojn en la intereso de la internacia Esperanto-movado kaj en la intereso de la unuopaj organizaĵoj de la partoprenantaj landoj mem.

2.7. Oni sendube povas diri, ke la Esperanto-movado en la menciitaj landoj — kvankam kun certaj diferencoj — ĝuas **relative** altan ŝtatan rekonitecon. La ŝtato kaj ŝtataj organoj rigardas la Esperanto-movadon ne sekto de stranguloj sed serioza kultura faktoro. Certagrade tio ankaŭ validas por la amasmedioj, kvankam tie tamen foje la subjektiva faktoro ludas grandan rolon. Ankaŭ sciencaj institucioj jam pli kaj pli rekonas la fakton, ke pri la fenomeno de funkcianta planlingvo, science priskribebla kaj priskribenda, unuavice kompetentas tiuj homoj, kiuj konas kaj uzas ĉi-tiun lingvon. Tio, tamen, ne ekskludas ankoraŭ la ekziston de konataj antaŭjuĝoj.
Retrorigardante la historion de la Esperanto-movado, aparte dum la lastaj jaroj, oni rimarkos, ke ankaŭ la organizaĵoj de la socialismaj landoj klopodas pli forte doni sian kontribuon al la internacia Esperanto-movado. Elokventa pruvo i. a. estas la lasta rezolucio de UNESKO, kiun aparte proponis — laŭ la stimuloj de la landaj asocioj aŭ unuopaj eminentaj aktivuloj — Jugoslavio, Bulgario, Ĉinio, Hungario, Pollando, Kosta Rika kaj San Marino, do inter ili 3 el la menciitaj 6 eŭropaj socialismaj landoj. Sed, sendube, la kontribuo povus esti ankoraŭ pli granda.

3. Kiuj estas la kaŭzoj por la priskribita situacio? Reatentigante pri la komence menciitaj objektivaj kaj subjektivaj faktoroj kaj pri la diferencoj inter la landoj, ni ŝatus resumi tiel:
Laŭ mia opinio de granda graveco estas la ekzisto de la sama politikekonomia sociorda tipo — de la socialisma sociordo — kvankam en la unuopaj landoj ne mankas diferencoj en la konkreta realiĝado kaj manifestiĝo. Tio signifas pli detale:

3.1. La teoria bazo de la socialisma ŝtato, la marksismo-leninismo, ne posedas unuecan aŭ pretan teorion pri la problemo de internacia lingvo, kvankam ne mankas diversvidpunktaj aludoj aŭ fragmentoj ĉe diversaj aŭtoroj. Marx kaj Engels mem nur periferie menciis en aliaj kuntekstoj universalan lingvon. Por ili, poliglotoj, ne ekzistis lingva problemo. Kaj la demando siatempe ne estis primara.[1]) Tamen, gravas la alineo de Marx en la komune kun Engels skribita verko „La germana ideologio", pri la signifo de konscia reguligado de la lingvo. Marx skribas „La natura kreskinteco de lingvo cetere estas nuligita en ĉiu alia plenevoluinta lingvo, parte pro la historio de la lingva evoluo el ekzistinta materialo kiel ĉe la romanaj kaj ĝermanaj lingvoj, parte

pro la interkruciĝo kaj intermiksiĝo de nacioj kiel ĉe la angla; parte pro koncentriĝo de la dialektoj interne de nacio al nacia lingvo, baziĝanta je ekonomia kaj politika koncentriĝo. Ke la individuoj siatempe prenos ankaŭ tiun produkton de la specio sub sian regon, kompreniĝas el si mem".[2])

Tiu ĉi opinio de Marx tre influis la marksisman lingvosciencon, kie oni ĝenerale agnoskas la fakton, ke la homo kapablas — certagrade — konscie influi la evoluon de lingvoj. De tiu agnosko al la konstruo de planlingvo nur estas kelkaj paŝoj, kvankam kvalite gravaj.[3])

3.2. Kvankam ekzistas legendoj, ke Lenin sin esprimis por aŭ kontraŭ Esperanto, sovetiaj esploristoj montris, ke similaj asertoj ne estas pruveblaj.[4]) Multe pli gravas la instruo de Lenin pri la samrajteco de nacioj kaj lingvoj. Estas konata i. a. lia eldiro: „Kiu ne agnoskas la samrajtecon de nacioj kaj de lingvoj kaj tion ne defendas, kiu ne kontraŭbatalas ĉiun ajn nacian subpremon aŭ nesamrajtecon, tiu ne estas marksisto, tiu eĉ ne estas demokrato".[5])
Estas konataj la grandaj klopodoj post la revolucio en Soveta Unio, doni al pli ol 40 antaŭe senskribaj lingvoj alfabeton kaj konscie evoluigi multajn lingvojn en Soveta Unio, antaŭe subevoluintajn. Finfine en tiu ĉi landego estas 130 lingvoj![6])
La spirito de la leninisma nacia politiko principe favorigas la klimaton kaj la komprenon pri internacia lingvo.

3.3. Tre grava por la sinteno al la problemo de internacia lingvo estas la prognozo pri la estonteco de la homaro. Kun negativa socia prognozo oni eble venos al la fatalisma konkludo pri la senelira hegemonio de la angla aŭ de 2 — 3 mondaj lingvoj.
Tiam ne restas loko por Esperanto. Ŝajnas al mi, ke pozitiva socia prognozo inkludas la koncepton pri paca kunekzistado de malsamsociordaj ŝtatoj. Ĝi inkludas la daŭran plidemokratiiĝon de la internaciaj rilatoj. Kaj tio favorigas ankaŭ la sendiskriminacian internacian lingvon. La marksismo-leninismo kiel instruo kaj la praktika politiko de tiuj socialismaj ŝtatoj, pri kiuj mi parolis, favorigas la pacan kunekzistadon.

Cetere, la konata slogano de Marx/Engels, presita sur la Komunisma Manifesto, enhavas interlingvistikan komponenton: „Proletoj de ĉiuj landoj unuiĝu!" Transnacia unuiĝo postulas transnacian komunikadon.

3.4. De granda graveco por la principe pozitiva sinteno de unu lando al la sendiskriminacia solvo de la internacia lingva problemo estas la lingvopolitika situacio de la nacia lingvo, ĝia internacia pozicio. La naciaj lingvoj de Bulgario, Ĉeĥoslovakio (la ĉeĥa kaj la slovaka) kaj Pollando kaj aparte de Hungario havas internacie preskaŭ nulan pozicion. Tiuj landoj tre bone komprenas kaj spertas la negativajn efikojn de la lingva problemo.
Ankaŭ pro tio la ĝenerala kompreno pri la avantaĝoj de Esperanto en ĉitiuj landoj estas relative granda, sendube pli granda ol ekz. en GDR, kies nacia lingvo, la germana, tamen ankoraŭ apartenas al la „Klubo de la mondlingvoj".

3.5. La principo de la demokrata centrismo, laŭ kiu la ŝtatoj, kun landaj modifoj, funkcias, havas avantaĝon por la centrigo kaj efikigo de la relative malmultaj movadaj fortoj. Ĝi havas krome avantaĝon por la laboro kun la amasmedioj, kun sociaj organizaĵoj, sciencaj institucioj k. s.

3.6. De nesubtaksebla valoro estas la rilatoj inter laborista movado kaj Esperanto-movado, aparte dum la 20aj kaj 30aj jaroj de nia jarcento. La tre dinamisma laborista Esperanto-movado, kun socialdemokrata, komunisma, anarkisma kaj aliaj komponentoj, per multaj konkretaj agoj montris la praktikan socian valoron de Esperanto por progresemaj celoj. Ni nur menciu la rolon de Esperanto en la batalo kontraŭ la faŝismo aŭ en la hispana milito kontraŭ Franko.
3.7. Kaj laste de avantaĝo por la evoluo de la Esperanto-movado en la socialismaj eŭropaj landoj sendube estas ilia teritoria kunligiteco, kio plifaciligas la aplikon de la lingvo.

4. Jen la resuma kaj certe mankhava provo iom skizi la ĉefajn karakterizaĵojn de la Esperanto-movado en malgranda sed tre aktiva eŭropa ŝtata grupo kaj eventualajn kaŭzojn. Ni tamen konstatu: Ne tiom gravas, kies kontribuo al la evoluigo de la tutmonda uzateco de Esperanto estas pli granda aŭ malpli granda. Gravas, ke ĉiu faru sian eblon utiligante la specifajn konkretajn kondiĉojn. Sed plej grava: ĉiuj klopodoj por Esperanto estas vanaj, se la homaro ne sukcesas bridi unufoje por ĉiam la danĝeron de la nuklea memdetruo.

**Notoj**


1) Kp. D. Blanke: Karl Marx kaj Friedrich Engels pri la „Langue universelle". En: „der esperantist", Berlin, N-ro 122 (6/1983), p. 121 — 126
2) Esperantigo laŭ la germana originalo el: Marx, K./Engels, F., Die deutsche Ideologie. Marx-Engels-Werke, vol. 3, p. 448, Berlin. Dietz 1973. Pri la ĝusta traduko de ĉi-tiu teksto kp. la kontribuojn en GDR-Paco, Berlin 1983, 1984, 1986.
3) Kp. D. Blanke, Pri la problemo de laŭplana influado je la lingvo-evoluo fare de la homo. En GDR-Paco, Berlin 1981, p. 24 — 31
4) Kp. S. N. Podkaminer, Lenin kaj Esperanto. En: D. Blanke (Red.), Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado, Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1986, p. 31 — 49
5) Esperantigita laŭ W. I. Lenin, Kritische Bemerkungen zur nationalen Frage, Berlin. Dietz, 1951, p. 14 (Kritikaj rimarkoj pri la nacia demando)
6) Kp. M. I. Isaev, National Languages in the USSR. Problems and Solutions, Moscow: Progress, 1977


*) Prelego prezentita antaŭ la 73-a Japana Esperanto-Kongreso en Osaka.

Detlev Blanke

**Resumo de Broŝuro de B. V. Tokarev**

## „Psikologio kaj metodiko de Esperanto-instruado

### (Gvidilo por Esperanto-instruistoj)."

Ekzistas diversaj gvidiloj por instruistoj. En iuj el ili oni detale priskribas, kiel klarigi al lernantoj uzadon de kazoj, verboj, participoj k.t.p. Tiajn gvidilojn oni povas tre ĝuste nomi la „kuirlibroj". En alia speco de la gvidiloj oni celas ekspliki ĝeneralan teorion de la instruado. Tiu broŝuro apartenas al la dua speco. Metodoj, aplikataj de la E-instruistoj estas pluregaj. Ordinare ĉiu instruisto uzas la solan, aŭ eksplikitan en iu lernilo, aŭ la propran. Ĉiu instruisto kutimiĝas al sia ŝatata metodo, kaj ŝanĝas ĝin same malofte, kiel homoj ŝanĝas sian profesion. Kaj preskaŭ ĉiuj instruistoj pli-malpli sukcesas. Evidente, la plej bona metodo estas tiu, kiun regas la instruisto. Li povas sukcesigi la plej malbonan kaj fuŝi, fiaskigi la plej bonan. De kio do dependas la sukceso de la instruado?

En la gvidilo estas farita provo starigi kiel bazon de tiu teorio la psikologion:

„. . . la ĉefa demando de la psikologio de la instruado estas — **kial** homo volas akiri certajn sciojn, kaj la ĉefa demando de la didaktiko — kiajn manierojn kaj metodojn oni uzu por krei kaj plifirmigi la deziron de lernantoj lerni. Do, **la psikologio difinas la metodaron.**"

Ĉiuj scias, ke se homo ne volas lerni, lin instrui ne eblas. Kaj male, se homo tre volas lerni ion, li faros tion malgraŭ ĉiuj obstakloj, en kondiĉoj de manko de instruisto (aŭtodidakte), malfacila akirebleco de helpiloj k. t. p. Tial la unua ĉapitro de la gvidilo estas dediĉita al la psikologio.

Kiel bazo por la ekspliko estas metita ideo de I. P. Pavlov, ke **la scio estas aro da kondiĉaj refleksoj.** Kaj ĉiu reflekso estas ligita kun certa instinkto, kaj responda al ĝi emocio. En la gvidilo estas donitaj difinoj de la nocioj

— emocio, instinkto, senkondiĉa kaj kondiĉa reflkesoj (la **emocio** estas ekscitiĝo de certaj cerbopartoj, la **instinkto** — kapablo de tiuj specialaj cerbocentroj ekscitiĝi, la **refleksoj** — estas movoj, farataj sub influo de tiuj ekscitiĝoj), surbaze de artikolo de la sama aŭtoro, presita pli frue („Pri psikologio de la instruado", Scienca Revuo, **26**, 17, 1975, en kiu unuafoje estas farita diferenco inter la nocioj „instinkto" kaj „senkondiĉa reflekso"). El tiuj premisoj senpere sekvas, ke **la scio ne estas nura informacio, sed estas ligita kun iaj emociaj travivaĵoj, kaj ke sukceso de la instruado povas esti en certa grado reguligata per konscia kunligado de donata informacio kun tiu aŭ alia ekscitilo, elvokanta certajn emociojn.** El tio siavice sekvas **la ĉefa principo de la instruado: krei kaj plifirmigi la deziron de la lernantoj lerni, por kio necesas uzi preskaŭ ekskluzive ekscitilojn, elvokantajn pozitivajn** (agrablajn) **emociojn; la ekscitilojn, elvokantajn negativajn emociojn oni uzu kun granda singardemo, nur en ekskluzivaj okazoj kaj bone pripensite.** La alia grava elirpunkto estas la divido de la instruado al la **deviga** kaj **nedeviga**. Post la unua la lerninto ricevas diplomon aŭ atestilon, donantan certajn gravajn rajtojn kaj avantaĝojn, kaj ĝuste la deziro ricevi tiun diplomon instigas ilin lerni. Dum la nedeviga instruado oni ne havas esperon ricevi iun prestiĝan kaj rajtodonan diplomon, kaj lernas por la propra plezuro. Kaj tiun plezuron la lernantoj devas ricevi. Estas kompreneble, ke necesas diversa aliro al la deviga kaj nedeviga instruado. Se dum la deviga oni povas instrui iel ajn, malbone, grize, eĉ fuŝe, trakti lernantojn neĝentile, krude, eĉ kruele — ja dezirante ricevi la diplomon la lernantoj finfine digestos ion ajn, — dum la nedeviga instruado tio tute ne eblas, ĉiu tiaspeca instruisto devas instrui talente, aŭ almenaŭ peni lerni manierojn de talentulo.

En la broŝuro estas priskribitaj diversaj manieroj de la emocia efiko al la lernantoj. Tiuj manieroj estas klasifikitaj konforme al skemo de senkondiĉaj refleksoj, ellaborita de disĉiplo de I. P. Pavlov, prof. S. S. Ĉaĥotin (tiu skemo estas donita ankaŭ en la lartikolo de B. V. Tokarev „Genetikaj ligoj inter sciendoj", Scienca Revuo, **18**, 51, 1967), laŭ kvar ĉefaj „koloroj". Efiko de ĉiu ekscitilo havas sian „emocian spektron" en kiu partoprenas diversspecaj emocioj. Kaŭzoj (motivoj) de homaj agoj, ankaŭ apero de deziro lerni ion, estas difinataj ĝuste per la emocioj. Tiu klasifiko permesas doni certajn ĝeneraligojn. Nome, dum la deviga instruado la ĉefan rolon ludas emocioj, ligitaj kun timo de nericevo de la diplomo, iaspeca „bastono", ligita kun instinkto de sindefendo. Sed dum la nedeviga instruado la ĉefan rolon ludas estetika efiko, kiu, laŭ prof. S. S. Ĉaĥotin, estas ligita kun seksa instinkto. Sed per nelerta instruado oni povas krei ĉe la lernantoj ankaŭ negativajn kondiĉajn refleksojn, ligitajn kun estetika sento, kaj la lernantoj abomenos la studobjekton. Tamen ne malgravan rolon ludas ankaŭ aliaj emociaj „koloroj", ekzemple deziro iel helpi al homoj, fari ion bonan. Kaj unu el la plej potencaj manieroj por tio estas la konscienca rilato de la instruisto al la prenitaj sur sin devoj. La lernantoj devas esti certaj, senti ĉiutage, ke la instruisto **volas**, ke ili ellernu, sed ne simple perlaboras siajn horojn. Kaj ja se li vere volas, ke ili ellernu, li certe trovos taŭgan manieron.

La ĉefaj specifaĵoj de E-instruado estas, krom la **nedevigeco, — aparta karaktero de Esperantujo, tuja uzebleco de la lingvo kaj ĝia facileco.** Ĉiuj ili estas favoraj por la instruado. Kompreneble oni ne devas aŭtomate transporti al la nedeviga instruado la „bastonajn" metodojn de la deviga, kun ĝia ofte tre enua maniero gvidi la lecionojn, kaj postulemo, fakte ludante ridindan rolon de ĝendarmoj sen potenco. Rigoreco, postulemo, mallaŭdoj, des pli minacoj estas certaj rimedoj por dispeli kursanojn. La dua specifaĵo, aparta karaktero de Esperantujo, sekvigas, ke se lernante iun fremdan lingvon, homo neniam sentas sin la mastro de la lingvo (li scias, ke la veraj mastroj estas reprezentantoj de alia popolo), lernantoj de Esperanto, eĉ komencantoj, estas jam tiaj mastroj.

Kun tio estas ligita la tuja uzebleco de Esperanto. Oni bone scias, ke lerni

fremdajn lingvojn estas tre utile, kaj pri tio estas diritaj multaj belaj vortoj. Sed post fino de lernejo, instituto, universitato, tiun scion uzas tre nemultaj, nome la du kategorioj de laborantoj: profesiaj lingvistoj, en ties nombro tradukistoj kaj instruistoj de la fremdaj lingvoj, kaj sciencoj laborantoj, por kiuj tiu scio estas necesa por informiĝi pri lastaj atingoj en koncerna branĉo de scienco, teĥniko aŭ novaĵoj de socia vivo. Akiri kapablan legi fremdlingvan literaturon kun sama kompreno kaj plezuro, kiel en la gepatra lingvo, oni povas nur post multaj jaroj de la lernado. Por trovi kunparolantojn en fremda lingvo oni devas veturi eksterlanden, kaj eĉ tie oni ne estas la parolantoj egalrajtaj al la indiĝenoj. Kun Esperanto la afero statas tute alia. Ellerninte la lingvon oni povas tuj ekuzi ĝin dum parolado kun aliaj esperantistoj en loka klubo, kie ĉiuj estas samrajtaj uzantoj de la lingvo, por legado de literaturo kaj kontribuado al la movado. Kaj en ĉiuj ĉi sferoj tiu kontribuado estas plenvalora. Kaj kvankam la facileco de Esperanto, ĝia simpla, logika kaj senescepta gramatiko kaj relative negranda radikaro donas grandan avantaĝon, kaj mem faras estetikan efikon, tiun facilecon oni ne devas trotaksi. Esperanto estas la lingvo, kaj por ĝin ekposedi necesas kreado de multaj kondiĉaj refleksoj, kio postulas memstaran laboron, kaj al tiu laboro la instruisto devas instigi. Inter tiaspecaj instigiloj estas fiero partopreni tiom signifan movadon kun certa estonteco, laŭdoj pro sukcesa respondo aŭ trovo de trafa esprimo. El la estetikaj rimedoj en kondiĉoj de Soveta Unio tre potenca rimedo evidentiĝis kantoj, ĝuste la komuna kantado kaj lernado de kantoj kaŭzas altan lingvan nivelon en sovetiaj Esperanto-tendaroj.

En lasta paragrafo de tiu psikologia ĉapitro estas prezentita opinio de V. I. Lenin rilate manierojn de plifirmigo de pozicioj de la rusa lingvo, la sola, kiu povis kaj povas nun roli kiel la pontolingvo inter diversaj popoloj en limoj de USSR. La granda revolucia gvidanto ĉiam insistis pri foresto de eĉ la plej malgranda altrudo, devigo, rilate la lingvon, „Ni ne volas peli onin en paradizon per klabo" — skribis li, kaj estis decide kontraŭ ekzisto de la deviga ŝtata lingvo (en la Konstitucio de USSR ne estas menciita iu ŝtata lingvo, kaj estas substrekata plena egalrajteco en uzado de lingvoj). Tio plene rilatas ankaŭ Esperanton, kaj tial en la nuna etapo de la movado ni devas esti **kontraŭ** deviga instruado de Esperanto. Kiam la popoloj, pro la vivbezono, ekonomiaj kaŭzoj k. t. p., komence en apartaj landoj, kaj poste en la tuta mondo memvole akceptos Esperanton, tian ĝia deviga instruado estos **postulata** de la popoloj, kaj pasos laŭ la plej natura kaj sendolora vojo. La deviga instruado de lingvo ne estas altrudo ja nur tiam, kiam oni bone **konscias** pri neceso de ties studado kaj ĝin postulas, dum antaŭtempa deviga instruado de Esperanto povas esti konsiderata kiel **altrudo**, kaj elvoki protestojn, kiuj ege malutilos al la disvastigo de la lingvo.

En la dua ĉapitro estas revuitaj diversaj metodoj de la lingvoinstruado. La ĉefaj metodoj estas tri: la rekta (pere de konversacio kun minimuma uzo de gepatra lingvo), la literatura (senpere traduko al la gepatra lingvo de bonaj literaturaj verkoj) kaj la gramatika („la tradicia"). La praktiko montras, ke ili estas uzendaj nur en kombino, kun adapto al konsisto de grupo kaj aliaj cirkonstancoj. La homoj, kun ilia senlima diverseco de karakteroj, ne estas trakteblaj kiel malvivaj objektoj de industrio, dum la nedeviga instruado ne aplikeblas universala ŝablono, iu detala metodiko, simila al kuirejaj receptoj aŭ teĥnologiaj reglamentoj. La nedeviga instruado estas malfacila afero, ĝi postulas de la instruisto grandan animan sindonon kaj inventemon.

La gramatikon oni povas ekspliki dedukte aŭ indukte. **Dedukti** signifas iri de ĝenerala principo al ĝiaj sekvoj; rilate la lingvon tio signifas kunmeti ekzemplojn surbaze de lernataj reguloj, kvazaŭ meĥanismon el detaloj. La mala maniero — iri el apartaj ekzemploj al ĝeneralaj reguloj nomiĝas la **indukto**. La natura (rekta) kaj literatura metodoj laŭ sia esenco estas la induktaj, dum en la gramatika povas esti uzataj kaj la indukta, kaj la dedukta manieroj. La indukto havas tiun

avantaĝon, ke la lernantoj kvazaŭ faras mem malgrandajn malkovrojn en la lingvo, mem ĝin analizas. Tio plifirmigas la lernantojn en fido al propraj kapabloj, altigas ilin en propraj okuloj, do kreas pozitivan kondiĉan reflekson. Tamen en malfacilaj okazoj la dedukta maniero povas evidentiĝi pli celkonforma. Por Esperanto, kun ĝia simpla kaj senescepta gramatiko, la indukta maniero devas esti la reganta, kaj nur en apartaj okazoj (ekzemple reguloj pri uzado de la artikolo, klarigo de kompleksaj verbotempoj, specifaj formoj kun infinitivo kaj diferenco inter radikaj kaj derivitaj adverboj) uzendas la dedukta.

En la gvidilo estas eksplikitaj ankaŭ ĉefaj principoj de la didaktiko laŭ **Comenius** (Komenski). Ili estas: a) pririgardeco; b) konscienceco; c) sistemeco kaj konsekvenceco; ĉ) indukta ekspliko; d) firmeco de la scio, akirata pere de kompreno pri la ligoj kaj pere de ripetado; e) ardigo de la scisoifo. Ĉiuj ĉi principoj estas ĝustaj kaj aplikataj, sed uzante ilin oni devas antaŭ ĉio meti la lastan, la plej gravan. Konsekvence uzante ĉiujn ĉi tute bonajn principojn krom la lasta, oni povas transformi lecionojn en ion enuan kaj abomenan. Certe oni devas demandi lernantojn pri la eksplikitaj fare de la instruisto scieroj, sed en la praktiko tio plej ofte aspektas tiel, ke unu el la lernantoj tremas ĉe tabulo pro timo ricevi malbonan poenton, dum la aliaj enuas, kaj ne scias, kion fari. La ripetado certe ankaŭ tre gravas, sed ĝia ĉefa senco estas en tio, ke iu vorto (aŭ alia sciero) pli aŭ malpli hazarde trasonu en emociplena situacio, kaj tiam ĝi, vere, estas bone memorota; sed por diversaj lernantoj tio povas okazi tute diversmaniere kaj dum diverstempaj ripetoj. La praktiko montras, ke vortoj, ne havantaj emocian koloron, ekzemple pronomoj, estas malfacile memorataj eĉ post multaj ripetoj, dum por tiaj emociplenaj vortoj kiel „ami" aŭ „morti" ne necesas la ripetado.

En la broŝuro estas mallonge prezentitaj kelkaj konataj metodoj de la lingvoinstruado (la metodoj de F. Gouin, W. Viäter, la interliniara analiza metodo, la mehanika-aŭtomata metodo kun kaŝita gramatiko — rig. R. Rakuŝa, „Instrumetodo por Esperanto", Ljubljana, 1957, la metodo de Lozanov kaj aliaj). En paragrafo dediĉita al lernolibroj de Esperanto estas revuitaj precipe tiuj, kie estas uzita iu originala metodo. Por la infanoj pleje taŭgas la rektaj metodoj. Ankaŭ tre gravas (por ĉiuj aĝoj) interesaj tekstoj. Verki universalan lernolibron, taŭgan por ĉiuj nacioj, fakte ne eblas; ĉiu lernolibro neeviteble havas sian „nacian akcenton", eĉ se ĝi estas titolita „La internacia". Diversaj specifaĵoj de patrolando de la aŭtoro neeviteble trafas en la teksto.

Plej detale estas pritraktita la fama **Cseh**-kurso (la aŭtoro mem estas **Cseh**-instruisto). Estas donitaj abundaj citaĵoj el „Informoj de la kurso" kaj „Kelkaj konsiloj al instruisto" de A. **Cseh** (Ĉe). Psikologiaj principoj de A. Ĉe estas plene aprobindaj, kvankam en lia kurso estas ankaŭ kritikendaj momentoj. Ekzemple, preskaŭ sola formo de la instruado estas la konversacio (A. Ĉe evitas nomi tion „lecionoj", li insistas en la kurso: „Vi ne lernas, kaj mi ne instruas, sed ni faras la esperantan konversacion". Ja la vorto mem „leciono", pro fervoro de instruistoj, iĝis la negativa ekscitilo). Estas tre dezirinde enigi en la kurson ankaŭ agrablajn legaĵojn, kantojn, ludojn k. t. p., do elementojn de literatura metodo, fakte transirante al iu elektanta metodo. A Ĉe opiniis malutila uzadon de lernolibroj, ĉar entuziasmaj lernantoj ofte antaŭlernas por lernolibro kaj per tio ili aŭ konfuzas sin mem, aŭ ĝenas la progresadon de la aliaj", kaj due, „Ĉar lernolibro ofte kutimigas al malordo. Bela vetero, interesa filmo aŭ societo facile forlogas la lernantojn de la leciono, ĉar ili ja povas relerni la lecionon el al libro. Dum la leciono la sama preteksto tentas al distriĝo." Tamen tiaj entuziasmaj lernantoj estas tre dezirindaj, kaj tutegale ja ili povas ie havigi al si iun lernolibron. Ke ili ne „ĝenu la progresadon de la aliaj", estas la afero de ilia ĝentileco kaj takteco, kaj la instruisto ankaŭ povas taktece reguligi tion. Foresto de lernantoj povas okazi ankaŭ pro tute seriozaj kaj estimindaj kaŭzoj; oni nur instruu

tiel, ke „bela vetero, interesa filmo aŭ societo" estu malpli allogaj, ol la esperantaj konversacioj.

La tria, kaj tre grava manko de Ĉe-kurso estas, ke dum ĝi estas aplikataj nur ekscitiloj, elvokantaj pozitivajn emociojn, agrablajn, kio ne emigas lernantojn pene labori memstare, tion povas rezulti nur negativaj ekscitiloj (en ĝusta dozado kaj apliko), kvankam certe, la pozitivaj devas esti la regantaj. Bedaŭrinde teorio de tio estas tute ne prilaborita. Ĉe-kurso ne estas adaptita al psikologio de homoj, vivantaj en kondiĉoj de socialismo, kaj tiurilate oni nepre devas fari certajn ŝanĝojn. Ekzemple sceno pri la „hispana etikedo" tute ne taŭgas; la sperto montras, ke post ĝi duono da lernantoj diskuras; malgrandaj donacoj fare de instruisto efikas malagrable. Grava psikologia eraro de A. Ĉe estas anekdoto pri muŝoj, falantaj en glasojn de biero, ĉar ĝi enhavas mokon pri alinacionoj, kio tute kontraŭas al spirito de Esperanto-movado.
La tria ĉapitro de la gvidilo estas dediĉita propre al la instruado, unuavice al ecoj kaj konduto de la instruisto. En lia laboro kaj tiu de la artisto estas multo simila. Ambaŭ povas esti lacaj, havi seriozajn malagrablaĵojn aŭ eĉ esti trafitaj per peza malfeliĉo. Sed se artisto, elirinte la scenejon, ludos pro tiaj kaŭzoj malbone, por li povas esti nenia pardono. Same la instruisto, transirinte la sojlon de la klasĉambro, devas lasi for ĉiujn siajn zorgojn; dum la leciono li devas sin regi perfekte, esti bonhumora, sagaca kaj ĝentila.

Rilate la elekton de lernomaterialo eblas du aliroj: aŭ oni la plej grava opinias la praktikajn bezonojn kaj la sistemecon, aŭ — la emocian efikon al la lernantaro. Ambaŭ postuloj estas malfacile kongrueblaj, ĉar verki plenvaloran artan tekston, havante taskon uzi certajn gramatikajn formojn kaj certajn leksikonajn unuojn, fakte neeblas. Ankaŭ estas tre malfacile elekti el la literaturo bonajn tekstojn, kiuj estus samtempe gramatike kaj leksike limigitaj tiel, kiel deziras la instruisto. La praktikaj bezonoj postulas, ke la kurso konsistu el la plej oftaj vortoj, kaj en bona literatura teksto preskaŭ neeviteble troviĝas vortoj neoftaj, aŭ eĉ tute raraj, kiuj poste estos la balasto.

Tamen neniu el tiu du principoj devas esti neglektata, kaj necesas trovi taŭgan mezan linion inter ambaŭ. La praktiko montras, ke tamen eblas trovi bonajn versaĵojn, enhavantajn nemultajn gramatikajn formojn. En tiuj tekstoj ĉiuj vorto asociiĝas por leganto kun iu emocio, kaj tial facile memorigeblas. Por plenumi la postulon pri ĝusta elekto de la plej oftaj vortoj povas servi konversacia formo. Dum lerta uzado, kiel en la kurso de A. Ĉe, tiuj vortoj ankaŭ ricevas certan emocian signifon. Sed ordinare praktikata maniero verki specialajn lernotekstojn, ofte tre enuajn, kiaj abundas en multego da lernolibroj, estas evitenda.

Rilate la planadon de la kurso, la plej taŭga sinsekvo de la gramatikaĵoj estas tiu uzita de A. Ĉe (tre skeme kaj koncize en la sekva ordo: -o; estas; -a; -j; -as; -n; -e; -u; pli, plej; -is; -i; -os; -ant-, -int-, -ont-; -us; -at-, -it-, -ot-). Sed oni devas memori, ke scio de la reguloj estas la kondiĉa reflekso de **formulado** de tiuj reguloj, sed tute ne kondiĉa reflekso de ilia uzado, kion oni devas krei aparte. Por detala ekspliko de la gramatiko pli konvenas la daŭriga kurso.

Dum la nedeviga instruado, penante formi kondiĉajn refleksojn, ligitajn kun agrablajn emocioj, oni devas eviti ĉion, kio jam en lernejoj k. t. p. asociiĝis kun neagrablaj travivaĵoj. Tio antaŭ ĉio rilatas la studkontrolon. Dum la deviga instruado la kontrolo de la scioj — en formoj de kontrolaj laboroj, studkontroloj kaj ekzamenoj — estas sufiĉe neagrabla afero por la lernantoj. Sed ĝi estas necesa, ja oni ne devas doni diplomon al nescianta homo. Neagrablaj travivaĵoj povas tute forpuŝi de certa studobjekto („Persone mi, post „varfolomeaj" studkontroloj de docento Varfolomejev, la ĥemion ne tre ŝatas" — el romano de V. Savĉenko „Malkovro de si mem").

Tial dum la nedeviga instruado diversaj kontroloj povas esti nur libervolaj, se lernanto mem deziras kontroli siajn sciojn kaj petas lin ekzameni. Tial, ekzemple, kontrolaj laboroj tute ne devas esti uzataj dum la nedeviga instruado, ĉar ili, pro jam delonge stabiliĝinta kondiĉa reflekso, elvokas negativajn emociojn. Kaj fakte tiu kontrolo eĉ ne estas bezonata. Ja sufiĉas unu — du demandoj, faritaj en tute neoficiala atmosfero, ekster ĉiaj „studkontroloj" kaj „ekzamenoj", kaj la nivelo de la lingvoscio estas tuj videbla. Kaj ja scio de Esperanto donas neniujn rajtojn, por kio servu neagrabla proceduro de la kontrolo? Prefere oni anstataŭ tio aranĝu koncerton de la finintoj, kvizon aŭ ion similan, kio restos en ilia memoro kvazaŭ festo.

La ekzamenoj estas necesaj kiam Esperanto estas nedevige aŭ fakultative instruata en kadroj de lernejo, fakultato de sociaj profesioj k. s., ĉar ja tie la noto estas skribata en atestilo aŭ alia dokumento, postulata de estraro. Sed eĉ en tiuj okazoj instruisto povas meti poenton surbaze de siaj scioj pri la lernanto. Kaj kiam la homo mem petas pri la ekzameno. En ĉiuj aliaj okazoj la ekzameno nur malutilas. Iu ne bone lerninta homo povas poste bonege ekposedi la lingvon, aŭ, eĉ malbone ĝin sciante, fari gravajn servojn al la movado. Sed estas tre dubinde, ke li faros tion post la ekzameno.

Ankaŭ libervola devas esti la ekzameno post la daŭriga kurso, sed nepre deviga antaŭ kaj post la supera, ĉar la lasta devas konfirmi sciojn de kursgvidanto.

Tre gravas dum la instruado la unuaj horoj, ĉar ĝuste dum tiuj horoj formiĝas kondiĉaj refleksoj, efikantaj dum la tuta kurso. La unua, kaj same la lasta leciono devas esti por lernantoj kvazaŭ festo. La tutan unuan lecionon devas trapenetri ĝojo de facila ekposedo de la lingvo. Dum la sekvaj la instruisto neniuokaze devas rapidi; li devas zorge observi, ke la komencaj, la plej gravaj kondiĉaj refleksoj bone firmiĝu, stabiliĝu, kaj nur post tio transiri al sekva materialo. Post atingo de aŭtomata uzo de „as", oni povas instrui jam pli rapide. Anstataŭigi instruiston, se tiu ien forvojaĝas aŭ malsanas, estas tre nedezirinda afero, prefere leciono tute ne okazu. Nova aŭ porokaza instruisto havas tute alian stilon de la instruado, kaj tio povas ege detrui jam atingitajn rezultojn.

La rolo de lernolibroj estas — liveri tekstojn, ekzercojn kaj sisteme eksplikitan gramatikon. La uzado de la lernolibroj estas neevitebla dum koresponda aŭ aŭtodidakta lernado, sed dum la ĉeesta oni povas instrui ne proponante al la lernantoj iun lernolibron; necesajn tekstojn, ekzercojn kaj gramatikajn klarigojn la instruisto povas prezenti mem. Sed se la lernantoj povas ne havi lernolibron, la instruisto nepre devas ĝin posedi — presitan aŭ propran, kaj ĝi estu lia „kuirlibro", enhavanta ĉiujn necesajn manierojn de la ekspliko.

Inter la t. n. „teĥnikaj helpiloj" neeviteblas la uzo de la „tradiciaj" (tabulo, kreto, bildoj, fotoj, diversaj objektoj k. t. p.). La „modernaj" helpiloj (sondiskoj, magnetofonoj, lumbildoj kaj filmoj) estas uzendaj nur en apartaj okazoj, ĉar por ilin apliki plejparte necesas prepara laboro, kiu povas tute detrui la lecionon.

Tre grava speco de la teĥnikaj helpiloj estas muzikaj instrumentoj por akompano de kantoj. Ekzistas tri ĉefaj manieroj de la akompanado: pianludado, gitarludado kaj magnetofona bendo kun anticipe skribita akompanaĵo. Aliaj muzikiloj (ekzemple akordiono) estas uzataj tre malofte. Piano eble, estas la plej bona tiurilate, sed lerni komplikan arton pianludi, des pli aranĝi por ĝi kantojn, ne eblas por homo, antaŭe ne tuŝinta la klavaron. Por ellerni la gitarludadon necesas almenaŭ kelkaj monatoj da intensa laboro, sed tio estas atingebla preskaŭ por ĉiu. La magnetofona akompanaĵo havas tiun mankon, ke estas neeble ŝanĝi la rit-

mon, al kiu la kantantoj devas akomodiĝi, dum kun uzo de muzikiloj oni povas ludi pli aŭ malpli rapide, halti, rekomenci k. t. p. La gitaro devas iĝi unu el la ĉefaj helpiloj, same kiel la „tradiciaj".

Tre grava tasko de la instruisto estas aktivigi la lernantojn al postkursa laboro. Ja la instruado de Esperanto havas du ĉefajn celojn: la **praktikan**, t. e. doni la lingvoscion, kapablon paroli unuavice, legi kaj skribi, kaj la **edukan** — formi kaj plifirmigi en la lernantoj ideojn de egalrajteco de ĉiuj popoloj, estimon la iliaj kulturoj, internaciismon, pacamon, aspiron labori por la ideo de Lingvo Internacia, t. e. ĉion, kion oni ordinare nomas „la interna ideo" de Esperanto. Kaj tiu dua celo estas eble eĉ pli grava, ol la unua, ĉar ĝuste la menciitaj ideoj instigas homojn lerni Esperanton; ne havantoj de tiuj ideoj ordinare al Esperanto-kursoj ne venas. Ne venas ankaŭ ne havantoj intereson al lingvoj ĝenerale.

Kaj ĉi tie ni renkontiĝas kun ĝenerala fenomeno, ke homoj amas la aliajn pro bono, farita al ili, kaj malamas aliajn pro farita al ili malbono. Same la homoj rilatas ankaŭ al la aferoj. Tial, se homo kontribuis per io al Esperantomovado, li emas plu helpi al ĝi, kaj se li malutilis, plej verŝajne li fariĝos malamiko de Esperanto. Tial la instruisto devas strebi, ke jam dum la elementa kurso oni ion faru por la movado. Sed li neniuokaze devas iel devigi aŭ rekte puŝi la lernantojn al tio, necesas fari tiel, ke ili **mem** ekdeziru ion fari, tre lerte kaj taktece. Kaj ne gravas, se la unua kontribuaĵo estas tre malgranda; tio povas esti — partopreno en aranĝo de eksterurba ekskurso, helpo en preparo de ekspozicio, rolo en skeĉo, elpaŝo dum amatora koncerto k. t. p. Eĉ tia bagatelo, kiel kolektado de ligno por fajro dum ekskurso aŭ esperanta renkontiĝo, povas havi decidan rolon por posta agado de novico.. Al tiu agado tre influas la grado de devigeco dum la lernado. Ju malplia estas tiu grado, ju malpli da negativaj emocioj havas la lernantoj, ju pli ili estas liberaj, des pli volonte ili poste kontribuos al la movado.

La devo de la instruisto estas ne nur instrui la lingvon; lia laboro estas vana, se li ne trovos manierojn ligi la lernantojn al per- kaj poresperanta laboro kaj ne edukos el ili verajn internaciistojn.

## Termine 1987

**I. Weltkongresse:**

1. siehe „der esperantist" Nr. 137 (3/1986), S. 57

**II. Seminare/Kurse**

2. Grundlagenseminar für Jugendliche, 11. — 16. 10. 1987 in Lychen
3. Grundlagenseminar für Fernkursteilnehmer, 25. — 30. 10. 1987 in Lychen
4. 9. Interlinguistik-Seminar, 11. — 15. 11. 1987 in Ahrenshoop
5. Intensivkurs in Bollmannsruh für Anfänger und Fortgeschrittene, 26. — 30. 10. 87. Informationen beim Esperanto-Verband, Bezirksvorstand Potsdam, Mangerstr. 34/36, Potsdam 1500.

**III. Internationale Veranstaltungen**

6. Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo, IFER '87, 13. — 15. 3. 1987. Anmeldung beim Kulturbund der DDR, Organiza Komitato IFER '87, Käthe-Kollwitz-Str. 115, Leipzig 7010.
7. Potsdama Somera Esperanto-Tendaro, PoSET '87, 22. — 29. 8. 1987. Anmeldungen bei Brigitte Raabe, Sulzbacher Steig 1, Staaken 1546.
8. Somera Esperanto-Familia Tendaro, SEFT '87, 15. — 22. 8. 1987. Informationen bei Werner Pfennig, Leibnizstr. 5/67, Neubrandenburg 2000.

**IV.**

9. IV. Zentrale Delegiertenkonferenz des Esperanto-Verbandes, 3. — 5. 4. 1987 in Leipzig

**V. Jugendveranstaltungen**

10. Fahrradtour junger Esperantisten, DERSFIB '87, 8. — 22. 8. 87. Informationen bei Detlef Kraus, Str. d. Friedens 18, Hoyerswerda 7700.
11. „Werkstattage der Kultur" junger Esperantisten, 25. 2. — 2. 3. 1987 in Halle. Informationen: Esperanto-Verband, Bezirksvorstand Halle, Geiststr. 32, PSF 101, Halle 4020.

Anmeldungen für 1. — 4. beim Esperanto-Verband im Kulturbund der DDR, Charlottenstraße 60, Berlin 1080.

# Leteroj

**Nia „juna" okdeknaŭjara amiko Naumo Sigal-Podolskij el Soveta Unio skribas:**

## Simbolo de Internacia Solidareco

En mia arkivo konserviĝis jena malnova informo: Docento Kirjuŝin en sia artikolo, aperinta en 1960j. en bjelorusa gazeto „Minska pravda", rakontis, ke dank' al helpo de esperantistoj dum 1928j. estis farita interŝanĝo de standardoj inter laboristoj de sovetia uzino, tiam „Komunar", kun laboristoj de la urbo Ruhla (Germ.). Inter laboristoj de tiuj urboj de 1926j. komenciĝis korespondado esperante. Venis al Minsk juna laboristo-esperantisto Karl Fjortŝ (Förtsch), kiu rakontis, ke polaj ĝendarmoj forprenis de li la standardon. Laŭ helpo de ministro pri eksteraj aferoj la standardo estis revenigita.
Ĝis la jaro 1933 la minska standardo ĉiam flirtis en la demonstracioj en la urbo Ruhla.
Kiam venis la faŝisma reĝimo la standardon oni kaŝis ĉe la kamarado Karl Pascher. En lia domo estis faritaj 17 traserĉoj, sed la standardon oni ne trovis. Nun la standardo troviĝas en la urba domo de Ruhla.
Estas interese ekscii ĉu ankoraŭ vivas tiuj kamaradoj kaj aparte, komprenebla, kie ili kaŝis tiam la standardon, kion la faŝistoj ne povis trovi tiel longe. Samtempe estas interese ekscii kiom da standardoj ankoraŭ estas en GDR kaj kiel ili estis konservitaj dum la faŝisma reĝimo. **Naum Sigal-Podolskij, Esperanto-veterano.**

## Informo de la redakcio

Pri la problemo de interŝanĝo de standardoj D. Blanke traktis en jenaj du materialoj:

— Pri la kontribuo de la laboristaj esperantistoj por la evoluo de la germana-sovetia amikeco en la tempo de la Respubliko de Weimar.
En: D. Blanke (Red.): Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado, Brdapest: Hungara Esperanto-Asocio 1978, p. 63 — 83 (dua eldono 1986)

— D. Blanke: Der Anteil der Arbeiter-Esperantisten bei der Entwicklung der deutsch-sowjetischen Freundschaft in der Zeit der Weimarer Republik, Erfurt, Kulturbund der DDR, 1974

## Letero al Rikardo Ŝulco

**Kelkaj rimarkoj por Richard Schulz (pron. Rifiard Ŝulc)**

Mi esperas, estimata sinjoro Schulz, ke mi ne ofendas vin, se mi vin alparolas per via propra nomo. Ankaŭ alimaniere mi neniukaze celas ofendi vin. Sed leginte vian publikan respondleteron al Germain Pirlot en „der esperantist" n-ro 3/86, ankaŭ mi havas demandojn al vi. Ekzemple: Kial vi nepre intencas esti „la" normiga kapo en esperantio? Mi ne estas tradukisto, sed nur leganto. Mia Esperanto-biblioteko certe estas tre modesta kompare al la via. Sed ĝi entenas tradukaĵojn el relative multaj landoj, de multaj diversaj tradukistoj. Kaj ĝi entenas ankaŭ vian tradukon de „La perdita honoro de iu Katarina Blum". Mi vere ankoraŭ foje foliumis.

Krom vi, ĉiuj tradukistoj rezignas esperantigi la nomojn de homoj. Aŭ ili uzas la nomojn originale, kun aŭ sen indikoj por la elparolo, aŭ ili transskribas ilin per la esperanta alfabeto, se tio necesas, sed ne esperantigas. Vi faris provon. Bone. Nun viaj legantoj diras al vi, ke la rezulto de tiu ĉi provo pro diversaj kaŭzoj ne plaĉas. Pri kio do disputi? Laŭ mi vi povas nomi vin kiel vi volas. Estas tute via persona afero. Sed, vi ne altrudu al la esperantistaro vian, evidente solan, opinion. Cetere, ĉar vi uzis Zamenhof kiel apoganton: Li ne volis, ke Esperanto, kiel Volapuko, estu elformita de unu homo.

Mi emfazas, ke mi nur celas vian traktadon de nomoj de homoj. La ĝenerala nocio „propra nomo" estas tro vasta. Por urbonomoj k. t. p. ekzistas jam kelkaj reguloj, laŭ mi sufiĉe bonaj, kvankam sur tiu ĉi tereno la diskuto certe pludaŭros. Lothar Müller

# Vortoj ne troveblaj en Krause kaj v. Waldowski

**S-ro Alfred Knapp el Bad Berka kompilis tiun ĉi liston de vortoj, kiujn li trovis en diversaj Esperanto-tekstoj, sed ne en la vortaro Esperanto-Deutsch de Erich-Dieter Krause (poŝvortaro) kaj la „Komplementa Vortaro de Walter von Waldowski, kiu aperis en „der esperantist" 36/37 (nov.-dec. 1969) — 52 (marto — aprilo 1972).**

**Eble la listo ne estas tute perfekta, sed certe utila por lingvo-uzantoj.**

**La red.**

**abnorma:** malnormala 2
**adversa:** kontraŭbatala 2
**agrostotigo:** 38 ?
**aĝioto:** (Zamenhof) spekulo pri la prezoŝanĝo de la borsaj valorajoj aŭ de komercajoj 7
**ahi!:** esprimo de akra bedaŭro 1
**alizo:** ĉiu el la regulaj intertropikaj ventoj (pli bona formo ol: trado aŭ pasato) 1
**ambigua:** dusenca, dubiga 1
**amoko:** murda frenezatako, precipe ĉe Malajoj 1
**anti-:** kontraŭ 2
**arida:** malfekunda pro troa sekeco 1
**arkano:** misterajo, sekretajo 1
**armorio:** blazono 9
**aŭspicio:** 2. antaŭsigno pri estonteco 4
**aŭstera:** frostkonduta — severmora, malĝoje rigora
2. severguste simpla, senornama 2

**babuŝo:** 2. turka pinta ŝuo 6
**bafi:** ofende kaj humilige moki 6
**bago:** valizo 4
**balisto:** militmaŝino por eljeti ŝtonojn aŭ trabojn 16
**bang!:** imito de eksplodo 1
**baraĝo:** remparo 17
**baro:** negranda restoracio kun vendado de sandviĉoj kaj alkoholajoj ĉe la bufedo 3
**barulo: barulino:** persono priservanta klientojn en la baro 3
**bas!:** malvivuo 1
**bastardo:** 2. eksteredzeca infano 4
**benefico-poŝtmarko:** bonfaro-poŝtmarko 9
**bestio:** sovaĝbesto 38
**beŝmeto:** kozaka longbaska vesto 23
**bizara:** malharmonie originala, ekstravagance stranga 2/13
**bohemio:** fantazia, ofte malriĉa vivmaniero de artistoj 1
**bonzo:** budaisma pastro 4
**braĉo:** galla pantalono 1
**braŭningo:** speco de revolvero 35
**brikabrako:** fatraso da antikvajistaj kuriozajoj 1
**brioĉo:** kuko franca, kun dika korpo kaj malgranda kapo 1
**brizo:** milda venteto 15
**budeno:** sangokolbaso 1
**bugri** (tr.): anuskoiti 1
**burgo:** fortika kastelo 8
**burko:** felta mantelo uzata de Kaŭkazanoj dum malbona vetero 7

**celadono:** sentimentala amanto el franca paŝtista romano 30

**ĉardo:** stepa aŭ kampara drinkejo, precipe hungara 1/26
**ĉipa:** malmultekosta 1

**darfi:** havi la permeson, la eblecon fari ion 36
**dariolo:** pastopoŝo, farĉita per viando aŭ fruktajo, kaj fritita 1
**defetisto:** pesimisto, anticipe preta akcepti malvenkon 1
**delekti:** plezurigi 2
**delico:** delikata ĝuo 8
**dentelajo:** filatelo — perforajo 9
**dentimetro:** filatelo — perforadmezurilo, odontometro 9
**desaponti:** seniluziigi 1
**desperi** (ntr.): malesperi 1
**devalui:** malplivalorigi monon 11
**disdegni** (tr.): malŝati, malrespekti 2
**disipi:** facilanime malŝpari 2
**diskordo:** malkonkordo 1
**dismo:** imposto de la dekonajo 1
**dispensi** (tr.): liberigi, malŝarĝi (je devo, peno ks) 1
**dista:** malproksima 1
**dolmano:** riĉe ornamita jako de nobeloj kaj soldatoj 20
**drogmano:** interpretisto 1
**drola:** komike stranga 38

**ebo:** malfluso 2
**egotismo:** elekto de la memo kiel bazo de moralo aŭ estetiko 1
**ek!:** instigo al ekirigo 1

**enciklopediistoj:** francaj filozofoj, kiuj en 18-a jarcento proponis liberpensadon 38
**engaĝi:** akcepti por posteno 3
**engaĝi sin:** aktive aliĝi al iu agado, entrepreno, afero 3
**eosto:** orientflanko 1
**epili:** kosmetike forigi- elŝiri harojn 3
**ergastulo:** malliberejo Roma por sklavoj 1
**erota:** erotika 1
**esajo:** filatelo — provpresajo 9
**estiel:** identiga „kiel" 2
**eŭtanazio:** metodo havigi sendoloran morton 38

**falva:** tre hele flava (pp bestoj) 1
**fantasmo:** timiga viziajo 2
**fonogenia:** (pri voĉo) taŭga por la radiodisaŭdigado, bele sonanta en la radiodissendo 3
**friso:** dika, draposimila teksajo 14
**friska:** malvarmeta 2
**fruktozo:** speco de karbonhidrato (ekz.) en mielo, dolĉaj fruktoj 38
**fugi:** (Zamenhofa formo!) forkuri, por sin savi de danĝero 14

**gagato:** mineralo treege nigra 19
**galgo:** mortpendigilo 13
**gejsero:** 2. aparato por liveri varman akvon 18
**gelo:** frosto 1
**gemuta:** (gem. gemütlich) — komfort-etosa, agrabla 38

**glebo:** terbulo 1
**graco:** favorkoreco 7
**graŭli:** kolermurmuri 1
**grefo:** ungego 1
**grioto:** acida ĉerizo 1
**grivoj:** lardorostaĵoj, frititaj kaj elpremitaj lardopecetoj 1
**guno:** juna bovino 12

**ĝenio:** bona, ŝirmanta spirito 2

**haciendo:** bieno, laktomastrumo en Sud-Ameriko 38
**halali!:** (interjekcio) — vokado kaj fanfaroj de la ĉasistoj 8
**halanĝo:** ŝercgalimatio 1
**hapi:** anasbleki 5
**hati** (tr.): malami 1
**hedonismo:** plezuremo kiel vivprincipio 2
**heko:** heĝo 14
**Helenio:** antikva Grekujo 18
**heri:** halti nepovante plu paŝi pro malhelpo 20
**herdo:** grego 38
**horto:** fruktoĝardeno 1
**hurti:** forte albatiĝi al io 1
**huŝi:** fortimigi per „huŝ" 2
**ĥato:** vilaĝa pajlotegmenta dometo 1
**ĥleno:** helena mantelo, surŝultre agrafita 1

**ikonoklasmo:** bild-detruismo 12
**ikonoklasto:** bild-detruisto 12
**imbecilo:** persono subevoluinta mense 3
**insinui** (tr.): milde enŝovi (ideon ks) 1
**invoki** (tr.): ateste alvoki 1

**jonio:** homina vulvo, kultata de Hindoj 1
**joviala:** temperamente gaja 1

**jigo:** speco de danco 1
**josi:** (tr.) provizore kovri per tero la radikojn de plantota planto, por konservi ĝin 7

**jujuo:** luksajeto, kurioza bagatelajo, ornamajeto, ludileto 1/2

**kabino:** negranda ejo, speciale aranĝita por difinita celo (ekz. k. de la stiristo en la aviadilo, de la stiristo en la aŭtomobilo, telefona k., baneja k., ŝipa k.) 3

**kantileno:** orelflata melodio 2
**kapono:** kastrita koko, kiun oni manĝas 4
**kardiogramo:** la diagramlinio de la korbatoj, fiksata helpe de la kardiografo 3
**kelenio:** mara testudo (keleno) 15
**kiĉo:** filistra artaĵo, plaĉa nur al malbongustuloj 1
**kirko:** preĝejo 11
**klami:** (ntr.) plurveĉe kriegi 1
**klareto:** 1. helruĝa vino 2. (en Anglujo) Bordozvino
**klaroskuro:** kontrasto de lumoj kaj mallumoj sur pentrajo 1
**klavikordo:** klavinstrumento, antaŭa al la fortepiano 1
**klostro:** 2. monak(in)ejo 2
**kloviso:** manĝebla konkbesteto mara 6
**knaki:** kraketi sub dentoj 12
**kojono:** testiko 1
**kolto:** pistolo 10
**kombinato:** kombinumo 37
**kombineo:** 1. kombinita virina subvesto. 2. kombinita vesto el pantalono kaj bluzo, por mekanikistoj ks. 1
**kompano:** kompaniano, kunvivanto, kunulo 1/5
**kompradoro:** komercisto, kiu agas kun sia dungitaro kiel kontraktita agento en servo al eksterlanda kapitalisto, ĉu por aĉeti aŭ vendi ĉu por plenumi difinitan servon, tiel ke la eksterlanda kapitalisto povas pli facile kaj pli profunde konduki sian negocon inter la indiĝenojn 15
**komunajo:** tero komune posedata de la kooperativanoj 5
**konferanseo:** programestro 4
**koniko:** duaorda kurbo 4
**konsilio:** konsilantaro 5
**koopo:** kooperativo 5
**kornedo:** standardlisto 4
**koŝmaro:** inkubsonĝo 1
**krino:** ĉiu el la longaj glataj haroj de ĉevala kolhararo aŭ vosto 1

**kruco:** 2. ordeno en la formo de kruco 3
**kupledo:** mallonga aktuala kaj sprita kanto, kutime kun refreno 3
**kurorto:** kuracloko, kuracbaneja urbo 37
**kurtko:** pola militista tuniko 31

**laktacio:** laktoprodukto 38
**lekto:** kuŝejo uzata de la romianoj dum manĝo 2
**licencio:** universitata rango 4
**lifa:** maldekstra 1
**lila:** siring-viola 8
**linda:** beleta 1
**listro:** ŝtofo, el kiu oni kudris virajn somervestojn (germ. Lüster) 10

**lokalo:** restoracio, kafejo, dancejo, amuzejo 3
**lontana:** malproksima 2
**lukri** (tr.): perlabori (monon) 1
**lukro:** enspezo ricevata de la laborado 1

**madamo:** sinjorino 3
**madejro:** dolĉa, forta vino el la insulo Madejro; saŭco spicita per tiu ĉi vino 3

**makabra:** mortorikana, terursenta 1
**maroto:** amata ĉevaleto 1
**mava:** malbona 1
**meharisto:** araba soldato rajdanta sur dromedaro mehari 27
**merdo:** fekajo 1
**meretrico:** prostituitino 1
**meteologio:** scienco pri la fizika stato de la atmosfero kaj fenomenoj en ĝi okazantaj 3
**midinetoj:** modistinoj. En vero la vorto „midinette" signifas „knabinoj de la tagmezo", t. e. Pariza ŝercnomo por laboristinoj, kiuj dum la tagmeza laborpaŭzo interkonatiĝas kaj flirtas kun sinjoroj 33
**midzi** (tr.): buŝkoiti 1
**minca:** maldika 1
**monolingvismo:** doktrino pri unu komuna lingvo por ĉiuj 4
**moskatelo:** muskatvino 1
**muezino:** preĝ-anoncisto islama 6
**mungi:** nazpurigi 12

**navigatoro:** persono fiksanta la trakon de ŝipo aŭ flugmaŝino 3
**nelge:** antaŭ ne longe 1
**nociva:** malutila 1
**noko:** kuirita pastopeceto 1
**nu:** vorto uzata por atentigi pri tio, kio sekvos 4

**oaristo:** ama interparolo (poemo) 1
**objeti** (tr.): kontraŭdiri, kontraŭmeti (malfacilaĵon) 1
**objeto:** refuta argumento 10
**odiseo:** heroo de greka poemo, kiu dek jarojn vagadis tra la mondo 4
2. priskribo de aventuroj de odiseo 37
**odontometro:** filatelo — perforadmezurilo, dentimetro 9
**olemoderila lampo:** lampo, en kiu la oleo estis mekanike suprenmovata per spiralrisorto 6
**opresi** (tr.): tirane premegi 1
**oranĝerio:** varma halo por konservi abrojn dumvintre 4

**pal:** Zamenhofa interjekcio esprimanta senzorgemon 22
bagateligo 8
**pafkolubro:** mezepoka kanoneto, longa kaj maldika, tiel nomita pro simileco al kolubro 6
**palaŝo:** pola sabro 25
**palatino:** reĝ-anstataŭanto 20
**palpiti** (ntr.): pulsadi 1
**pantuno:** kiksforma poemo 1
**paraŝitoj:** en la antikva Egipto homoj okupiĝantaj pri preparo de la homaj kaj bestaj korpoj por mumiigo 16
**pastiĉo:** literatura imitaĵo 38
**pastloj:** el unu peco da ledo kudritaj molaj kamparanaj ŝuoj 28
**pentagono:** laŭvorte kvinangulo. Per tiu nomo estas konata la Militministerio de Usono 38
**peplomo:** trastebita vat- aŭ plumkovrilo 1
**perkelto:** paprika stufita bovaĵo 1
**permanenta:** daŭranta sen interrompo 38
**pifpafi:** brue krakadi (maŝinpafilo, motoro) 5
**pilafo:** ĝi estas preparata el kokina viando kaj rizo 24
**pita:** malgrand(aĉ)a 2
**plumono:** korpokovra plumŝtopita kusenego 5
**poka:** malmulta 1
**polilingvismo:** plurlingvisma doktrino 4
**poluiĝo:** malpuriĝo 38
**pranzo:** posttagmezmanĝo 21
**prefaco:** antaŭparolo 1
**precioza:** rafinita en sia parolo 1
**premiero:** la unua prezento de dramverko en koncerna enscenigo kaj en koncerna loko 3
**primavero:** printempo 1

**priseko:** privata sektoro 1
**profilo:** 2. speciala kvalifiko 38
**prohibi** (tr.): malpermesi 1
**psitl:** silentu (interjekcio) 5
**pul:** esprimo de naŭziĝo pro malbonodoro aŭ fieco 1
**puento:** la esenco de la spritaĵo; la kulmina momento de la rakonto, esprimata ĝian sencon 3

**rabeleza:** plumpe, ofte krude ŝerca 1
**rafita:** propra al la malsano rafito; (fig.) malforta, subevoluinta 3
**razio:** rabinvado 1

**redempti:** (tr.) religie elaĉeti 1
**Redemptoro:** la Elaĉetinto 1
**refleksio:** pli profunda medito, pripenso kunligita kun analizo 3
**rehabiliti:** (tr.) redoni al iu erare kondamnita liajn rajtojn aŭ honoron 1

**reprodo:** (mallongigo =) reproduktaĵo 4
**reproduktaĵo:** kopio 9
**riflo:** speco de pafilo 6
**rinki:** brue tintegi 8
**riposti** (ntr.): rebati al antaŭa rebato 1
**rodli:** veturi sporte per glitveturilo 32
**rori:** leonbleki 6
**ruĝo:** ruĝiga ŝminko 1

**salamo:** seka, malmola kolbaso 1
**satisfakcio:** kontento pro atingita rezulto, pro suferitaj maljustaĵoj 3
**sbiro:** policisto en la iama eklezia ŝtato; ankaŭ murdisto, ekzekutisto, turmentisto, rabisto 13
**senjoro:** sinjora moŝto, mastro 1
**siro:** senjoro (alparole) 1
**siringa:** siringkolora 9
**sistro:** (Zamenhof) antikva egipta muzikilo konsistanta el metalaj vergetoj sonantaj per skuiĝo 7
**skarifiki:** kuraci per sanga ellaso 29
**skipo:** grupo da laboristoj deĵorantaj samtempe 38
**slabo:** ebena plato el ŝtono aŭ ŝtalo 1
**softa:** milda, malsevera; mallaŭta 17/8
**spektatoro:** rigardanto 11
**standarto:** deviga ŝtata dokumento difinanta la teknikajn postulojn, al kiuj devas respondi krudaĵo, materialo, industriaĵo k. a. tipa modelo; kriterio, normo, bazo de io: nivelo 38
**stencilo:** Membrano, kiun oni traboras per skribilo aŭ tajpilo, kaj klu servas poste por reprodukti per inko-transŝvito la originalan tekston 11
**stinki** (ntr.): malbonodoraĉi 1
**suspendi:** eksigi el la ofico provizore, ĝis la fino de la disciplinproceso 5
**svetero:** trikotita jaketo 1

**ŝakero:** metala ujo en la formo de botelo, por la preparado de kokteloj 3
**ŝlemilo:** naivegulo, napokapo 1
**ŝlifi:** faceti, akrigi, erodi per frotado 8
**ŝovinisto:** fanatika patrioto 4
**ŝkriki** (ntr.): ĵeti akutan, ŝiran ekkrion, tranĉe voĉi kiel terurita virino 1/2

**tartano:** lana drapo, kun strekoj de diversaj koloroj; uzata kiel signo de gento de la Skotoj 19
**teknikumo:** (meza teknika lernejo), faklernejo 37
**televando:** televida vando (vando-mureto dividanta ejon) 10
**tenejo:** loko, ĉambro, kie oni konservas ion 38
**tetbeŝa paro:** filatelo — renversita paro 9
**tilo:** disfibrilo de teksvegetaĵoj 1
**titubi:** paŝi ŝanceliĝante de ebrio aŭ svenemo 2
**trankvi:** (mallongigo =) trankviliĝi 4
**trepidi** (ntr.): fortege skutremi (pp maŝino ks) 1
**troglodito:** kavernulo 4

**trolio:** floro (Trollius) 38
**tsl:** Zamenhofa interjekcio ordonanta silenton 22
**tutelo:** kuratoreco (f) 1

**valeto:** persona servisto precipe por prizorgi vestajojn, tualeton ktp. 19

**valga:** kurbagamba, tondilkrura 1
**vasko:** fontana tonkego 1
**veo:** lamenta krio 4
**vegeti:** vivi inerte 4
**vendeto:** hereda venĝemo (precipe Korsika) 1
**vermifugo:** (Zamenhof) kontraŭverma kuracilo 7
**vermilono:** cinabro 9
**vertago:** speco de hundo kun mallongaj kruroj 4

**zefiro:** (Zamenhof) agrabla milda vento 7

## Fontindikoj

1 Parnasa Gvidlibro II-a eld. 1968 KALOCSAY, WARINGHIEN, BERNARD

2 MADÁCH „La tragedio de l'homo" 1965, trad. KALOCSAY

3 BRANDYS „Kiel esti amata" 1964, trad. GRUM

4 AULD Paŝoj al plena posedo 1974

5 SÁNTA „Dudek horoj" 1966, trad. BENCZIK, BOTOS, SOMLAI, TÁRKONY

6 DAUDET „Tartarin de Taraskono" 1955, trad. DELOR, LE BRUN

7 WARINGHIEN „Lingvo kaj vivo" 1959

8 BEZRUČ Sileziaj kantoj 1970, trad. PUMPR, KOŘINEK, HROMADA

9 KUCHARSKÝ Fremdsprachige Korrespondenz für Philatelisten 1966, trad. MAŘIK

10 NESVADBA „La perdita vizaĝo" 1973, trad. STAŇURA

11 FAULHABER „Ne tiel, sed tiel ĉi!" 1965

12 ČAPEK Libro de apokrifoj, trad. VONDROUŠEK

13 SZCZYPIORSKI „Sub la Nobla ĉevalo" 1964, trad. WIECKO

14 EICHENDORF „El la vivo de Netaŭlugo", trad. BENNEMANN

15 Noveloj de LUSIN 1963, trad. ELPIN, KO, PANDIŠO, ZEE, TIKOS, FON, YONGSEN

16 PRUS „La faraono" 1957, trad. KABE

17 „der esperantist"

18 Taglibro de Anne Frank 1959, trad. DEGENKAMP

19 POE Ses noveloj 1924, trad. MILWARD

20 GÁRDONYI „Sklavoj de dio" 1972, trad. HAMVAI

21 FEKETE „Vuk" 1966, trad. LESZKÓ

22 MÉRIMÉE „Colomba" 1938, trad. BEAU

23 LERMONTOV Kaŭkazaj Rakontoj 1964, trad. STARITSKY

24 ANDERSEN Fabeloj, unua volumo, 1965, trad. ZAMENHOF

25 PRUS „Pekoj de l'infaneco" 1963, trad. GRABOWSKI

26 BENEDEK Hungaraj fabeloj 1979, trad. BENCZIK

27 Baza literatura krestomatio 1979

28 TAMMSAARE „La mastro de Kõrboja" 1976, trad. KÄRT

29 CHRISTENSEN „La fingro de la diablo" 1957

30 IMMERMANN „La karnavalo kaj la somnambulino" 1952, trad. WOHLTHAT

31 CHAMISSO „Petro Schlemihl" 1922, trad. WÜSTER

32 BERGER „Niko kaj Nina"

33 GALDERT „Trifoje akurate je la dekdua horo . . .", trad. ELLERSIEK

34 ROSSETTI Kvarapo

35 NAJIVIN „Kiso de la reĝino" 1950, trad. STARITSKY

36 Slovaka antologio 1977, trad. KOŘINEK, SEEMANN, ROSA, ŠATUROVÁ-SEPPOVÁ, LUKÁŠ, TVAROŽEK, VALAŠŤAN-DOLINSKÝ

37 „Bulgara Esperantisto"

38 „Paco"

# La gazetaro pri ni 1985

# Rekordo!

## 1. Centraj gazetoj

### 1.1. Fakrevuoj k organoj de fakorganizajoj

— **Fremdsprachenunterricht,** 3/85: informo pri la 6a interlingvistika seminario 1985; = 1

### 1.2. Aliaj centraj gazetoj k revuoj

— **Neues Deutschland,** SED, 13. 4. 85: mallonge pri E en Hispanio; 5. 8. 85: 70a UK; 14. 8. 85: 23a pola E-kongreso; 6. 9. 85: pri distrikta renkontiĝo en Berlin; 14./15. 9. 1985: 5a IMEK en Schwerin; 19. 11. 85: E-prospekto pri Ernst-Thälmann-Memorejo; 29. 12. 85: prezento de la libro de d-ro Blanke „Internaciaj planlingvoj. Enkonduko";

— **Neues Leben,** julio 85: pri junulara korespondado en E;

— **Mitteilungsblatt,** Kulturbund, 1/85: informoj pri kontrakto inter distrikta estraro de Schwerin kaj ASE kaj la 6a interlingvistika seminario, 3/85: distrikta renkontiĝo okaze de la 40aj datrevenoj- liberigo el faŝismo k fondiĝo de Kulturligo, informo pri 60a naskiĝtago de H. Heinel k B-doktoriĝo de d-ro Blanke, 4/85: fiksitaj datoj: 5a pionira renkontiĝo en Strausberg, PoSET, E-renkonto en Wörlitz, 6/85: fiksitaj tagoj: 77a interlingvistika seminario k internacia seminario pri E-instruado por plenkreskuloj, informoj pri IMEK k 70a UK;

— **Sonntag,** Kulturligo, 49/85: E-agado en la distrikto Suhl, 46/85: E-agado en la distriktoj Halle k Karl-Marx-Stadt;

— **Tribüne,** FDGB, 4. 1. 85: informo pri lernebleco de E en GDR, 3. 4. 85: E-renkontiĝo de pacdefendantoj en Pardubice;

— **Die Trommel,** Pionierorganisation, artikolo pri la 5a E-renkontiĝo de gelernantoj de Straus-Lago;

— **Der Morgen,** LDPD, artikoloj ekster la serio: 7. 8. 85: inter informoj pri filateliaj novajoj atentigo pri la 70a UK, 5.6 10. 85: invito al E- renkonto por gejunuloj en Neubrandenburg;

— **Nationalzeitung** Berlin, NDPD, 4. 4. 85: ampleksa respondo al demando pri lernebleco j de E, 9. 10. 85: pli longa artikolo pri internacia renkontiĝo en Berlin-Marzahn;

— **Wochenpost,** 4. 10. 85: respondo al leganto pri Ido k E; = 27

## 2. Distriktaj gazetoj

### 2.1. Berlin

— **Berliner Zeitung,** SED, 2./3. marto 85: pri artefarita lingvo „Romanid" kompare al E, 11./12. 5. 85: nia ŝatokupo E, 18. 6. 85: informo pri renkontiĝo de sovetiaj k E-istoj el Berlin, 18. 7. 85: E en ekspozicio de kulturligo, 16. 12. 85: internacia seminario de E-instruistoj; = 5

### 2.2. Cottbus

— **Lausitzer Rundschau,** SED, 6. 3. 85: informo pri E-kurso, 9. 5. 85: 53 jaroj germana-soveta amikeco de E-istoj, 21. 5. 85: informo pri Buchenwald- k Sachsenhausen-prospekto en E, 3. 7. 85; E en kulturligo, 15. 8. 85; E-kurso, 23. 9. 85: internacia pacrenkontiĝo de E-junularo, 10. 10. 85: E-kurso en pionirdomo, 25. 10. 85: 6a distrikta renkontiĝo, 30. 10. 85: informo pri Ido k E, 4. 12. 85: invito al Zamenhoffesto; = 10

### 2.3. Dresden

— **Sächsisches Tageblatt,** LDPD, 11. 3. 85: artikolo pri IFER 85, 25. 9. 85: internacia pacrenkontiĝo de junaj E-istoj; = 2

### 2.4. Erfurt

— **Das Volk,** SED, 4. 1. 85: informo pri E-renkontiĝo (Weimar), 17. 2. 85: tradicia renkonto de laboristaj E-istoj (Waltershausen), 14. 6. 85, 15. 6. 85 k 22. 6. 85: renkontiĝo kun sovetaj E-istoj (Heiligenstadt, Waltershausen, Apolda), 25. 7. 85 ŝakfestivalo de E-istoj (Weimar), 20. 9. 85: por E-interesatoj, 1. 10. 85: artikolo pri Ido k E, 4. 10. 85: lingvo ligas (Waltershausen), 7. 11. 85: junulara renkontiĝo de E-istoj (Waltershausen), 17. 12. 85: E-istoj renkontiĝis (Heiligenstadt);

— **Thüringer Landeszeitung,** LDPD, 4. 1. 85: informoj pri E-renkontiĝo, 5. 1. 85: fondiĝo de E-grupo en Weimar, 8. 3. 85: E-intensa kurso, 7. 6. 85: E-gastoj en Waltershausen, 28. 6. 85: urbokonduko per E (kun bildo) Weimar, 28. 6. 85: E-istoj renkontiĝas (Eisenach) 3. 8. 85: E-isto Adolf Schmidt pioniro, 6. 8. 85: 70a UK, 16. 8. 85: antaŭ 75jaroj- virinoj k E (Gotha), 21. 8. 85: E-istoj el 11 landoj (Eisenach), 20. 9. 85: varbado por diapozitiva vespero en E, 29. 10. 85: IIa Turingia Junulara E-renkonto (Waltershausen), 31. 10. 85: E-istoj renkontiĝis (Eisenach);

— **Thüringer Tageblatt,** CDU, Weimar, 4. 1. 1985: E-renkontiĝo, 12. 2. 85: E-istoj renkontiĝas, 20. 3. 85: E-istoj al IFER 85, 21. 5. 85: kien hodiaŭ? fakgrupo E (Heiligenstadt) 19. 5. 85: internaciaj kontaktoj per E (Weimar), 22. 6. 85: E-istoj el Sovetunio, 20. 7. 85: lingvo ligas popolojn (Dienstedt), 19. 9. 85: varbo por E, 20. 9. 1985: por E-amikoj (Weimar);

— **Thüringer Neueste Nachrichten,** NDPD, Erfurt, 12. 6. 85: amikoj per E, 28. 6. 85: konduko tra la urbo per E (bildo), 20. 9. 1985: por E-amikoj;

— **Glaube und Heimat,** evangelia gazeto, Jena, 8. 9. 85: ekumeno sen tradukisto, okaze de la 70a UK;

— Der **Gummiwerker,** Waltershausen, 2/85: „Nuda inter lupoj" en E (kun bildo), 12/85: sovetiaj E-istoj ĉe ni, 16/85: daŭra amikeco kun Sovetunio;

— **Der Fahrzeugbau,** Waltershausen, 3/85: junulara renkontiĝo de E-junuloj, 4/85: E-rememoroj, 6/85; varbo por E-kurso, 7/85: IFER 85, 8/85: „Nuda inter lupoj" en E, 15/85: amika renkontiĝo kun sovetaj E-istoj, 20/85: planoj; = 48

## 2.5. Frankfurt/Oder

— **Neuer Tag,** SED, 11. 1. 85: varbo por E-kurso en Popola Altlernejo (Eisenhüttenstadt), 23. 7. 85; artikolo pri E-agado en la subdistrikto, sept. invito al informa vespero, 3. 10. 85: informo pri E-renkontiĝo por gejunuloj (Bad Freienwalde), 5. 10. 85: E-istoj vizitas eksterlandon (Wriezen), 11. 10. 85: varbo por E-kurso, 21. 12. 85: internacia E-renkontiĝo de gejunuloj Zamenhoffesto; = 8

## 2.6. Gera

— **Thüringer Neueste Nachrichten,** NDPD, 6. 8. 85: 70a UK, 14. 8. 85: 23a pola E-kurso, 7. 9. 85: informo pri vizito en Sovetunio kaj samtempe informo pri nova E-kurso, 20. 9. 85: distrikta E-renkontiĝo kaj varbo por E-kursoj;
— **Thüringer Landeszeitung,** LDPD, 6. 8. 85: 70a UK, 7. 9. 85: nova E-kurso, 14. 9. 85: E-kurso por komencnatoj, 21. 9. 85: distrikta renkontiĝo; = 9

## 2.7. Halle

— **Freiheit,** SED, 7. 6. 85: 1a semajnfina E-seminario, 3. 9. 85: artikolo pri la 2a E-pacrenkontiĝo en Wörlitz (Gräfenhainichen), 24. 10. 85: informartikolo pri E-renkontiĝo de gejunuloj;
— **Liberal-Demokratische Zeitung,** LDPD: 19. 2. 85: E 100 jara, 3. 4. 85: pacrenkontiĝo en Pardubice, 12. 4. 85: forumo pri E, 7. 6. 85: 1a distrikta E-renkontiĝo;
— **Der Neue Weg,** CDU, 25. 1. 85: nova baza E-kurso, 23. 3. 85: forumo kune kun URANIA pri E, 4. 5. 85: artikolo pri E „ĉu plan- aŭ artefarita lingvo"; = 10

## 2.8. Karl-Marx-Stadt

— **Freie Presse,** SED, 17. 1. 85: ampleksa kontribuo pri leteroj, kiuj ligas la popolojn, 16. 4. 85: intensa korespondado kun sovetaj amikoj, 6. 6. 85: bulgara E-isto en Schwarzenberg, 21. 6. 85: 20 jaroj E en Kulturligo por paco kaj interkompreniĝo, 28. 6. 1985: E-istoj en Karlovy Vary (internacia turisma renkonto), 30. 8. 85: invito al nova -kurso, 23. 9. 85: E-renkontiĝo por paco, 5. 11. 85: E-renkontiĝo de gejunuloj (Kun bildo), 15. 11. 85: pri E-agado;
— **Vereinte Kraft,** Oelsnitz, sen dato artikolo pri E-feriado en Pollando;
— **Esda-Blickpunkt,** 2. 10. 85 E-renkontiĝo de junuloj (kun bildo); = 11

## 2.9. Leipzig

— **Leipziger Volkszeitung,** SED, 9./10. 3. 85: pri IFER 85 kaj E ĝenerale, 16. 9. 85: prelego pri E, 18. 12. 85: artikolo pri E k lerneblecoj;
— **Sächisches Tageblatt,** NDPD, informo pri E k aplikeblecoj;
— **Mitteldeutsche Neueste Nachrichten,** NDPD, 7. 3. 85: IFER 85 k E;
— **Die Union,** CDU, IFER 85;
— **Der Schmiedewerker,** Rosswein, 17. 5. 85: renkontiĝo kun sovetaj geamikoj;
— **effektiv,** Böhlen, 10. 4. 85: amplekse pri IFER 85; = 8

## 2.10. Magdeburg

— **Volksstimme,** SED, 27. 4. 85: artikolo pri longjara amikeco kun sovetaj E-istoj, sen dato: sovetaj E-istoj en Magdeburg;
— **Magdeburger Zeitung,** 21. 3. 85: E-istoj el Magdeburg ĉe IFER 85, 30. 5. 85: E-agado en distrikto, 4. 7. 85: E-renkontiĝo kun sovetiaj E-istoj;
— **Neuer Weg,** CDU, 21. 3. 85: informo pri IFER 85, 30. 5. 85: prelego de d-ro Krause pri Indonezio, 13. 7. 85: pli longa artikolo pri E-agado de geedzoj Plümecke (kun bildo), 10. 10. 85: bulgaraj gastoj en Magdeburg);
— **Union,** CDU, 21. 3. 85: IFER 85; = 10

## 2.11. Neubrandenburg

— **Freie Erde,** SED, 23. 1. 85: informoj pri E-kurso en subdistrikta vesperlernejo, 5. 2. 85: emociiga letero el Francio, 8. 2. 85: E-seminario kun kvizo, 9. 2. 85: anonco E-kurso en vesperlernejo, 26. 2. 85: E-prelego (ambaŭ Nbg.), semajnfina E-kurso (Demmin), 12. 4. 85: informa prelego pri E (Demmin), 13. 4. 85: E-istoj ĉe pacrenkontiĝo Pardubice, 26. 4. 85: nova fakgrupo E en Demmin, 24. 5. 85: 9a E-konferenco de norddistriktoj, 15. 6. 85: prelego pri E, 19. 6. 85: partneraj rilatoj kun Koszalin, 21. 6. 85: E en ekspozicio de Kulturligo, 25. 6. 85: DERSFIB 85-perbiciklado al SEFT, 13. 7. 85: E-agado en Waren, 16. 8. 85: E-kurso en vesperlernejo, 15. 8. 85: E-istino ĉe mondfestivalo en Moskvo (kun bildo), 24. 8. 85: SEFT 85, 28. 8. 85: nova junulara E-grupo, 7. 9. 85: E en domo de pioniroj, varbo, 12. 9. 85: prelego pri E, 14. 9. E-grupo en junulara klubo, 17. 9. 85: E-prelego, 17. 9. 85: DERSFIB al SEFT 85, 26. 9. 1985: nova E-kurso, 4. 10. 85: E-kurso en la pionirdomo, 31. 10. 85: norddistrikta renkontiĝo kun amikoj el Koszalin, 27. 11. 85: semajnfina seminario;
— **Norddeutsche Neueste Nachrichten,** NDPD, 7. 2. 85: E-agado en la distrikto;
— **Elan,** Neubrandenburg, 1. 4. 85: mondvasta korespondado de E-istoj;
— **Postrakete,** Neubrandenburg, 1a aprila n-ro: IFER 85, 2a febr. n-ro: informo pri E-agado, 1a marta n-ro: nova E-kurso;
— **Antriebsrad,** Neubrandenburg, 18. 8. 85: prelego pri E;
— **Vereinte Kraft,** Neubrandenburg, 9. 8. 85: belaj E-ferioj en Pollando (kun bildo); = 35

## 2.12. Potsdam

— **Märkische Volksstimme,** SED, 18. 1. 85: artikolo pri E k E-agado en la distrikto, 13. 3. 85: ampleksa intervjuo kun L. Schödl, aprilo 85: E-amikeco kun Sovetunio, 30. 5. 1985: printempa E-renkontiĝo en Brandenburg, 13. 9. 85: la POSET, 13. 9. 85: varbo por perletera E-kurso, 21. 11. 85: semajnfina E-seminario, 13. 12. 85: Thälmann-prospekto en E;
— **Brandenburger Neueste Nachrichten,** NDPD, 24. 6. 85: pacletero el Japanio, 7. 9. 85: POSET-85, 3. 11. 85: semajnfina E-kurso, varbo;
— **Märkische Union,** CDU, 8. 6. 85: semajnfina kurso;
— **Start,** Ludwigsfelde, 20. 3. 85: M. Lennartz vizitos TEJO-kongreson; = 13

## 2.13. Rostock

— **Ostseezeitung,** SED, 7. 2. 85: varbo por semajna vespera E-kurso, 7. 3. 85: varbo por perletera E-kurso, 11. 4. 85: pk interŝanĝo kun E-ekspozicio, 4. 6. 85: E-renkontiĝo de la norddistriktoj, 22. 6. 85: E en ekspozicio de Kulturligo, 3. 7. 85: E k tagoj de Kulturligo, 31. 7. 85: kontraktoj kun Poprad k Tarnovo (ĉiuj Stralsund), 13. 8. 85: 23a E-kongreso en Pollando (Rostock), 21. 8. 85: dankon el Tokio, 13. 9. 85: varbo por E-kurso (Stralsund), 30. 9. 85: junulara E-pacrenkontiĝo, 16. 10. 85: fondiĝo de E-grupo antaŭ 20 j., 6. 11. 85: pk-interŝanĝo kun E-ekspozicio, 13. 12. 85: E-kontrakto kun Szczecin;

— **Norddeutsche Neueste Nachrichten,** NDPD, 17. 1. 85: longa artikolo pri H.-J. Borgwardt, i. a. E-okupo, 7. 2. 85: invito al E-kurso, 7. 3. 85: varbo por perletera E-kurso, 11. 4. 85: pk-interŝanĝo k E-ekspozicio, 22. 5. 85: E-kontrakto kun Poprad k Tarnovo, 5. 6. 85: renkontiĝo de la norddistriktoj, 22. 6. 85: ekspozicio de Kulturligo kun E-parto (ĉiuj Stralsund), 22./23. 6. 85: 20a jubileo de E-grupo (Rostock), 6. 8. 85: 70a UK, respondo el Japanio, 30. 8. 85: informo pri nova E-kurso (Stralsund), 10. 9. 85: IMEK 85 en Schwerin, 16. 9. 85: finiĝo de IMEK (Rostock), 11. 10. 85: 20jara E-grupo (Rostock), 7. 11. 85: pk-interŝanĝo kun E-ekspozicio, 13. 11. 85: 20 jaroj E-grupo en Stralsund;

— **Demokrat,** CDU, 2. 1. 85; artikolo okaze de la 120a naskiĝtago de L. Zamenhof, 16. 1. 85: honore al A. Schweitzer, 7. 2. 85: varbo por E-kurso, 7. 3. 85: varbo por perletera E-kurso. 11. 4. 85: publika pk-interŝanĝo k E-ekspozicio, 22. 5. 85: E-kontraktoj kun partneraj urboj, 17. 8. 85: infandesegnaĵoj en Stralsund en Japanio, 6. 9. 85: informo pri nova E-kurso (ĉiuj Stralsund), 28. 9. 85: E-grupo 20 jara (Rostock), 15. 10. 85: sama enhavo, 9. 11. 85: pk-interŝanĝo k E-ekspozicio, 13. 12. 85: dankon el Japanio; = 44

## 2.14. Schwerin

— **Schweriner Volkszeitung,** SED, aprilo 85: pri E-kontaktoj, 9. 9. 85: gastiga urbo por IMEK 85, 10. 9. 85: IMEK, 14./15. 9. 85: artikolo pri IMEK, 18. 9. 85: same, 26. 10. 85: artikolo pri E-korespondado de E-istino;

— **Der Demokrat,** CDU, 2. 1. 85: 125a naskiĝtago de Zamenhof (kun bildo), 12. 1. 85: sukceskaŭzoj de E (Levsen), Ludwig Renn estis E-isto (Levsen), 9. 9. 85: amplekse pri IMEK 85 (kun bildo), 17. 9. 85: intervjuo de partopreninto de IMEK, 29. 11. 85: pri E-movado (Levsen);

— **Norddeutsche Zeitung, LDP**D, 6. 9. 85: IMEK 85, 10. 9. 85 IMEK 85;

— **Norddeutsche Neueste Nachrichten,** NDPD, 30. 8. 85: IMEK 85; = 15

## 2.15. Suhl

— **Freies Wort,** SED, 7. 8. 85: 70a UK, 19. 11. 85: semajnfina kurso (Ilmenau); = 2

## 3. Resuma pritakso

**1) Ni atingis denove rekordon! 1982: 303 kaj ĉijare 258 laŭ la supra listo + 25 de P. Levsen en „Der Morgen" + 20 de Levsen en la CDU-gazetoj, do denove sume 311!**

**2) La diferenco inter la unuopaj distriktoj restis. Erfurt, Neubrandenburg k Rostock, jam en la pasinta jaro kun la plej aktivaj korespondantoj, eĉ plimultigis siajn publikigojn je pli ol dek. Ĝojige, ke ankaŭ Potsdam evidente plivigliĝis.**

**3) Novaj tendencoj:**

1. **pli multaj korespondantoj sendis artikolojn al la distriktaj kaj subdistriktaj redaktejoj;**
2. **pliiĝis la nombro de junaj kontribuantoj;**
3. **la kontribuoj estis pli enhavoriĉaj. Malpliiĝis la „nuranoncoj" (kiuj ankaŭ necesas), pliiĝis varbo por novaj kursoj kaj artikoloj pri E-aranĝoj ligitaj kun laŭeble detalaj informoj pri E, ofte tre lertaj;**
4. **informoj pri samaj E-aranĝoj al diversaj gazetoj fariĝis ofte pli variaj laŭstile.**

## 4. Mallongigoj

k = kaj
SED = germana mallongigo por Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio
CDU = Kristan-Demokratia Partio de Germanio
LDPD = Liberaldemokratia Partio de Germanio
NDPD = Nacidemokratia Partio de Germanio
FDGB = Libera Germana Sindikata Ligo
IFER = Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo
SEFT = Somera Esperantista Familia Tendaro
POSET = Potsdama Somera Esperantista
IMEK = Internacia Medicina Esperanto-Konferenco

**Kompilis Ingrid Schödl**

## Serio de Peter Levsen 1985 en „Der Morgen"

En la taggazeto „Der Morgen" (La Mateno) dum la jaro 1985 aperis jenaj artikoloj de Peter Levsen:

578: Radikoj de Esperanto (pri la fontoj), 4. 1.
579: Vortradikoj kaj ŝanĝiĝoj, 18. 1.
580: Multfaceta Esperanto-programo (pri la planoj de GDREA) 1. 2.
581: Vortoj kun multaj signifoj (polisemio kaj homonimio en Esperanto) 15. 2.
582: Vortoj por sciantoj (esperantonimoj), 1. 3.
583: Foira renkontiĝo de esperantistoj (IFER'85), 15. 3.
584: 3120 Esperanto-paĝoj (pri „der esperantist"), 29. 3.
585: Konkurenco por Esperanto? (Romanid, Adli, Vikto), 14. 4.
586: Koloraĵoj pri la lingvo (18a Konsultiĝo), 26. 4.
587: Literaturo en Esperanto pri faŝismo, 17. 5.
588: Informoj en nova vestaĵo (pri „Saksa Kuriero"), 31. 5.
589: Ĉiutaga konversacio, 14. 6.
590: Sovetiaj esperantistoj en GDR, 28. 6.
591: Ĉiutaga konversacio, 12. 7.
592: Infanoj, junuloj kaj Esperanto, 26. 7.
593: Konversacioj, 9. 8.

594: 70a Universala Kongreso, 23. 8.
595: Henry Barbusse kaj Esperanto, 6. 9.
596: IMEK'85, 20. 9.
597: Konversacioj, 4. 10.
598: Konversacioj, 18. 10.
599: Konversacioj: 1. 11.
600: Konversacioj, 15. 11.
601: 7a interlingvistika seminario en Ahrenshoop, 29. 11.
602: Se demandas la kuracisto (1), 13. 12.

Sume 25 artikoloj

Sendube la redakcio tre ĝojas ricevante leterojn de legantoj, kiuj ja pruvas, ke la serio estas legata kaj bezona. Do skribu al: Der Morgen, Redaktion, Johnanes-Dieckmann-Straße 47, Berlin 1080. Kiel oni vidas, la serio donas rapide informojn pri aktualajoj kaj samtempe ofertas legaĵojn kaj materialojn por la lingva perfektiĝo, parte eĉ uzebla en kursoj. Do- rekomendo estas, ke multaj GDREAnaoj abonu tiun entute tre interesan jurnalon.

## Dua artikola serio de Peter Levsen 1985

Krom la konata serio en „Der Morgen" Peter Levsen publikigas duan serion en kelkaj distriktaj tagĵurnaloj, kiuj apartenas al la Kristandemokratia Partio. Aperis 1985 jenaj kontribuoj (plej ofte „dialogoj de ĉiutaga uzo"):

**Der neue Weg,** Zeitz, 12./13. 1. 85: Pri sukcesoj de Esperanto kaj iliaj kaŭzoj; 9./10. 2. 1985: Dialogoj 55 — 58; 8./9. 2. 85: Reguloj de la Fundamento; 8./9. 3. 85: Reguloj de la Fundamento; 1./2. 6. 85: Ludwig Renn skribis en Esperanto; 27./28. 7. 85: Dialogoj 62 — 64; 10./11. 8. 85: Pri planlingvaj projektoj; 2./3. 11. 85: Dialogoj 68 — 70; 30. 11. / 1. 12.85: Porpaca batalo;

**Der Demokrat,** Schwerin, 12. 1. 85; Pri sukcesoj de Esperanto kaj iliaj kaŭzoj; 27. 7. 85: Dialogoj 62 — 64; 29. 11. 85: Porpaca batalo;

**Der neue Weg,** Magdeburg, 9./10. 3. 85: Sukcesoj de Esperanto kaj iliaj kaŭzoj; 3./4. 8. 1985: Traduko de poemo de L. Renn;

**Der neue Weg,** Halle, 6. 4. 85: Dialogoj 59 — 61; 4./5. 5. 85: Artefarita lingvo aŭ planlingvo?

**Thüringer Tageblatt,** Weimar, 6. 4. 85: Dialogoj 59 — 61; 7. 9. 85: Dialogoj 65 — 67; 30. 11. 85: Porpaca batalo;

**Die Union,** Leipzig, 4./5. 85: Artefarita lingvo aŭ planlingvo? 5./6. 10. 85: Kiel nuntempe statas Ido?

20 artikoloj

(Tio estas la minimumo, ĉu la artikoloj estas represitaj en kelkaj aliaj distriktaj gazetoj. Ni tamen ne ĉiam ricevis provekzemplerojn)

**El la fotoservo pri IFER'86**

Jen momento de la inaŭgura programo de IFER. Oni komune kantas la malnovan laboristan kanton, la „Internacio". En la antaŭo de maldekstre dekstren: prof. d-ro Peter Held, prezidanto de la Distrikta Estraro de KL Leipzig; Walter Kresse, iama ĉefurbestro de Leipzig, nun prezidanto de la asocio de komunumaj parlamentoj de GDR; Zhou Qianyuan, direktorino de la Esperanto-Sekcio ĉe la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio.

## Unua terminologia kurso

Ĝi okazis de la 1a ĝis la 5a de septembro 1986 en Roudnice nad Labem (ČSSR). Unuafoje en la historio de Esperanto, sciencistoj instruis universitatnivele dum kvin tagoj pri terminologia terminografia kaj lingvistika minimumoj, laŭ lernolibro disdonita, kiu meritas apartan recenzon (Jan WERNER, „Terminologia kurso", Sdruženy klub ROH, Roudnice n. L., 1986, 88 paĝoj). 28 esperantistaj fakuloj el kvin landoj (BG, CSSR, GDR, HU, Italio) partoprenis strecan programon, kiu ĉiutage ampleksis 3 instruhorojn, 1 ekzercohoron, malgrandan ekskurson kaj trihoran vesperan problemdiskuton. La prelegantoj (J. Werner, CS; Dr. Spitz, CS; Dr. Kavka, CS; W. Blanke, GDR; Dr. D. Blanke, GDR) peris konojn ege utilajn por fakuloj kaj pliprofundigis la konscion pri la nepra neceso de terminologia kaj terminografia laboroj. En parte akraj diskutoj la fakuloj plifirmigis la rekonon, ke ne sufiĉas verki sciencajn artikolojn kaj kolekti fakajn terminojn, sed ke aldone kaj samtempe necesas laŭsistema terminografia laboro laŭ la paŝoj lernitaj en tiu ĉi kurso. La homaj kaj fakaj kontaktoj ege pliriĉigis la partoprenintojn. La ekskursetoj al Říp, al Terezin (koncentrejo Teresienstadt) kaj al la vidindaĵoj de Roudnice nad Labem estis bonvenaj distreroj. La kondiĉoj de la kurso estis bonegaj, dank' al la afabla kaj diligenta laboro de s-ro J. Laube, kiu organizis ĉion, kunlabore kun la Scienc-teknika Sekcio de ČEA kaj kun la Sindikata Klubo en Roudnice n.L..

Dum la vesperaj diskuthoroj, la fakuloj pludonis siajn spertojn kaj ellaboris la necesajn sekvajn paŝojn por la espereble fondota en 1987 Terminologia Esperanto-Centro.
Al la iniciantintoj de la kurso, speciale al la s-roj J. Werner kaj J. Laube, ni ŝuldas dankon pro tiu kurso, kiu transdonas al la vasta publiko la sciencajn laborajojn de la grandaj terminologoj Wüster, Drezen kaj aliaj. Per ĝi komenciĝis la epoko de la esperanta fakterminologio en pli vasta praktiko.

Michael BEHR, partopreninto.

## Esperantlingva afiŝo kontraŭ generalo Franco

1986 oni rememorigis pri la batalo de la hispana popolo kontraŭ generalo Franco (prononcu Franko), kiu daŭris de 1936 — 1939.
La Militär-Verlag (Militara Eldonejo) en Berlin eldonis ĉi-jare en la serio „Militärgeschichtliche Skizzen" (militarhistoriaj skizoj) riĉe ilustritan kaj dokumentitan volumon de Horst Kühne: Krieg in Spanien 1936 — 1939 (Milito en Hispanio 1936 — 1939). Sur paĝo 10 oni trovas ege impresan afiŝon de PSUC (Partido Socialista Unificado de Cataluna, Unuiĝinta Socialista Partio de Katalunio). Ĝi estas plene en Esperanto.

## Tazio Carlevaro

## BLANKE, Detlev: „Internationale Plansprachen. Eine Einführung". Berlin 1985: Akademie-Verlag. 408 p., broŝurita (Sammlung Akademie-Verlag: Sprache, No 34).

Delonge oni sentas la bezonon je science orientita libro pri interlingvistiko. Aperis ja pluraj remuldajoj kaj suprajaj tekstoj (laste: la verko de Andrew Lange), sed tio neniel nutras ne nur sciencan esploron, sed ankaŭ sanan scivolon. Tamen, la esperantistoj kutimas, ĉe la aŭtoro D-ro D. B., je valoraj kontribuajoj, en fakaj revuoj kaj en fakaj libroj [1977 (red.): „Esperanto, lingvo, movado, instruado"; 1979 red.): „La Internacia Lingvo: sciencaj aspektoj"; 1981: „Plansprache und Nationalsprache, Einige Probleme der Wortbildung"; 1982: „Esperanto und Wissenschaft"]. Do temas pri aŭtoro, kiu meritas atenton.

En la **enkoduko** la aŭtoro evidentigas, ke interlingvistiko, t. e. la scienco pri lingvoplanado kaj pri planitaj lingvoj, apartenas al lingvistiko, al kiu ja ĝi kontribuas en praktiko kaj en teorio. Planlingvo reprezentas science analizindan fenomenon, nuntempe parte almenaŭ miskonata kiel tia.

Komence, en la unua ĉapitro, la aŭtoro pritraktas la **rilaton inter lingvoplanado kaj planitaj lingvoj**. Li ekzamenas la aferon el lingvohistoria vidpunkto, evidentigante la „ilecan" karakteron de lingvo, t. e. i. a. la eblon (eĉ la neceson) socibaze ĝin gvidi. Cetere, plimalpli konscie, tio jam okazis en beletro, ktp.. Do, lingvo estas principe planebla por diversaj celoj kaj en la kadro de diversaj momentoj, kiujn la aŭtoro analizas tra pluraj sistemoj („tipologioj"; nome laŭ Bausani, R. M. Meyer, Guérard, k. a.), resumante, kaj proponante propran. En ĝi Blanke distingas prave inter planlingvo kia Esperanto (malfermita sistemo) kaj planita lingvoskemo kia i. a. Pascal aŭ Basic (fermitaj sistemoj). En lingvoplanado, li akurate pritraktas aktualan analizon de planada aktivo en kadro de transiro de etna lingvo al nacia lingvo, en lingvoskribigo, en leksikosistemigo, ankaŭ el socia vidpunkto. Blanke substrekas la fakton, ke en interlingvistiko ekzistas cetere pluraj terminoj indikantaj planlingvon (i. a.: planlingvo, artlingvo, konstruita lingvo, lingvoprojekto, sintezigita lingvo . . . ktp.), inter kiuj li proponas detale analizi la semantikan kampon.

Dua ĉapitro de la libro koncernas la kuriozan fakton, ke ekzistas **pluraj projektoj de planlingvo.** B. evidentigas, ke ekzistas multaj kaŭzoj de lingvokreo, i. a. motivoj pacifismaj, lingvofilozofiaj, naciistaj . . . kaj ke plejmulto de la aŭtoroj ne estis profesiaj lingvistoj. Sed pri planlingvo lingvistoj ne ĉiam silentis: pluraj esprimis sin pri eblo kaj maleblo, kaj, eventuale, ili proponis studojn pri detaloj en difinitaj kampoj de praktika tekniko, de reguleco, de facileco, de ekonomikeco de skribo kaj elparolo (fonemaro), de leksiko kaj de gramatiko. Blanke opinias, ke tia laboro eblas nur se oni starigas komparajn principojn en

lingvistiko, kaj aparte se oni povas iel evidentigi „malavantaĝojn" kaj „avantaĝojn" en komunika praktiko de malsamaj lingvaj apartajoj. Laŭ li, do, ne ĉiuj lingvoj estas same facilaj kaj same taŭgaj por iu ajn celo. Temas pri elstare pensiga ĉapitro, kiu meritus plidetaligon.

En la tria ĉapitro, la aŭtoro ne povas eviti tradiciajon, nome **pritrakton de planlingvotipologio** (de la klasika Couturat-a, ĝis la plej modernaj, de Kuznecov kaj de Szerdahelyi). Principe, B. preferas plurdimensian tipologion, en kiu socia enradikiĝo kiel aparta dimensio ne povas manki. Laŭ li, do, ekzistas ne nur lingvoprojektoj, sed ankaŭ duonplanlingvoj, sed unusola vera planlingvo (Esperanto). B. klopodas proponi reprezentajn ekzemplojn de la malsamaj tipoj de planlingvoj: nome de la pazigrafiaj (nur skribaj) lingvoj ĝis „filozofiaj", t. e. ideo-klasigaj projektoj, tra neklasigeblaj aprioraj projektoj . . . sed plejparte li skribas pri aposterioraj sistemoj (modifitaj etnaj lingvoj, ĉu antikvaj, ĉu modernaj, „kompromisaj" [t. e. miksitaj] sistemoj, ĉu „naturalismaj" [aŭ pli bone: „novlatinidaj" sistemoj]). En la unuopaj ĉapitroj, B. detale pritraktas celon, strukturon, historion kaj socian disvolviĝon de la sistemo, aparte baziĝante sur originale studita materialo. Tre bone B. pritraktas tiel Latino Sine Flexione, Solresol, Occidental, Interlingua-IALA, Novial. Sed plej akurate li donas bazajn informojn pri Ido kaj pri Volapük, plej gravaj respektive post kaj antaŭ Esperanto, baziĝantaj sur analogaj sociaj portantoj, kun simila motivado. Laŭ B., Ido estis grava en la kreo de memstara esperantologio, kaj en la fiksigo de lingva stabileco (kiu cetere montriĝis necesa eĉ al Ido mem).

La kvara ĉapitro estas **dediĉata la Esperanto**, kiel la sola kaj la vera planlingvo, t. e. kun plena socia dimensio. Laŭ la aŭtoro, Esperanto ne estas nur projekto, sed lingvo enradikiĝinta. B. komence pritraktas kelkajn tezojn pri la „ideologio" de Zamenhof, kiu, laŭ li, estis „progresema burĝhumanisto", kiu atendus nur ellaboron marksisman-leninisman (laŭ mia opinio, ĉi tiu ĉapitro estas iom tro „diamata"). Pli grave, B. substrekas la fakton, ke lingvo kia Esperanto ne povas naskiĝi jam preta, sed ke ĝi devas evolui de minimuma lingva bazo al ellaborita socibaza sistemo, sur bazo de rilato inter evolutendencoj kaj stabilecotendencoj, t. e. surbaze de rilato inter normokodigo kaj latentomalkovro/evolua aldono. Sekvas longa parto pri **struktura aspekto de Esperanto**, sur la bazo de abundega bibliografia aparato: grafemiko, fonemiko, morfemiko, etimiko, vortkonstruo, vortsemantiko, sintakso. Ni trovas en tiu ĉi ĉapitro profundajn pritraktojn pri lingvoniveloj en planlingvo (kiuj laŭ B. ne estas socideterminitaj, sed lingvoalproprige determinitaj), kaj pri funkciaj stiloj (beletro, scienco, ktp.). Lasta demando: kiel **konkrete** evoluas Esperanto? Principe, en la Esperanto-movado, t. e. en la konkreta diaspora grupo ĝin portanta, kaj kultivanta parte proprajn kulturajn valorojn. Ĝuste de tiu diaspora uzo venas la demando pri la praktika uzo de la lingvo.

Mirinda libro, kiun proponas al ni B., vere altnivela informminejo, skribita en science ekvilibrita maniero, senantaŭjuĝa, senpolemika, valoriga, konstata, kleriga. Rimarkindas la fakto, de ĉiu pritema subĉapitro estas akompanata de abundega kvanto da piedpaĝaj notoj; librofine troviĝas pli ol 100-paĝa riĉega bibliografio, dividita laŭ la ĉapitroj kaj la subĉapitroj, kiu tial iĝas bonega **komentita** enkonduka bibliografio. Tiu impona notaro kaj bibliografia aranĝo, kaj la teksto mem, iĝas min opinii, ke tia libro meritas tradukon en . . . la anglan, ĉar, certe bedaŭrinde, la germana lingvo ne plu rolas en sciencaj rilatoj, kiel pli frue.

Maloftegas la preseraroj. La prestipoj estas iom malgrandaj, sed la broŝurigo estas bonkvalita kaj rezista. Du rimarketoj (sed ja neniu scias ĉion): Leau nomiĝis **Léopold**, kaj ne „Louis", kaj Julian **Proròk** estis kaŝnomo de Edgar de Wahl. Tazio Carlevaro

[El „Planlingvistiko" 17/1986]

## Georgij Korotkievič — 70-jara

Malnova amiko de nia lando li estas. Ofte li vizitis nin kaj havas multajn personajn ligojn al nia Asocio. Georgij Korotkiewicz el Moskvo fariĝis la 1an de septembro 1986 70-jara. Tuj post la milito Georgij apartenis al tiuj sovetiaj oficiroj, kiuj helpis forigi ruinojn, spiritajn ruinojn. Kiel ano de la sovetia milita administrejo Georgij Korotkievič laboris kiel jurnalisto, havis intimajn kontaktojn kun Eduard Claudius, Johannes R. Becher kaj la plej altan distingon, la Johannes-R.-Becher-aliaj. De Kulturligo de GDR nia amiko ricevis medalon en oro. Tio jam estis antaŭ multaj jaroj. Niaj koraj gratuloj iris al la jubileulo, al kiu ni deziras por la estonteco bonfarton kaj sanon. GDREA

## PoSET finiĝis

1986 estis la dua fojo, ke la esperantistoj de la Distrikta Estraro de GDREA en Potsdam organizis PoSET, t. e. Potsdama Somera Esperanto-Tendaro, la 30-an de aŭgusto '86 la tendaro finiĝis ĉe bivak-fajro en agrabla atmosfero. Valoras substreki, ke la ferman programeron partoprenis la 1a distrikta sekretario de Kulturligo en Potsdam, k-do Wätzold, PoSET'86 partoprenis 70 esperantistoj el Bulgario, ČSSR, GDR kaj Hungario. Nur el Bulgario venis 30 personoj.

## Ni kore gratulas al

— Rudolf Eichler, iama laborista esperantisto kaj aktiva membro de GDREA en Schwarzenberg, kiu fariĝis 75-jara la 20-an de septembro 1986.
Krome la jubileulo estis distingita per la Johannes-R.-Becher-medalo en oro.
— Sabine Fiedler el Leipzig, kiu promociis la 28an de aŭgusto 1986 al dr. phil. Ĉion bonan al d-rino Fiedler.
— Wera Dehler kaj D-ro Detlev Blanke, kiuj geedziĝis la 22-an de majo 1986.

## Ni funebras pro la forpaso

— de Walter Lukas el Bautzen (11. 7. 86) en aĝo de 75 jaroj,
— de Jaroslav Klement el Karlovy Vary (11. 6. 1986), kiu tre multe agadis por la kunlaboro inter esperantistoj el Ĉeĥio kaj GDR.

**Nikola Aleksiev: Mia porpaca agado. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1986, 93 p.**
La aŭtoro, meritplena funkciulo en la sindikato, kultura, porpaca kaj esperantista movadoj, veterano de la bulgara komunista partio, denove donas pruvon pri sia neelĉerpebla kreiva laboro. La volumeto entenas antaŭparolon de Nano Kjučukov, omaĝan al la aŭtoro. Aleksiev donas detalan kaj interesan aŭtobiografion, kiu aparte informas pri lia esperantista vivo. Estus tamen dezirinde, ke lia biografio entenu pli da informoj pri lia neesperantista socipolitika agado. Tiu grava flanko, sen kiu li ne fariĝintus trifoja laŭreato de la Dimitrov-ordeno, estas nur periferie meniciita. El la listo de la bulgarlingva verkaro de N. Aleksiev oni konkludas facile pri lia elstara loko en la bulgara sindikata movado. Post la biografio sekvas la represo de la broŝuro „Georgi Dimitrov pri la Esperanto-movado kaj pri la pacbatalo", aperinta 1982, kiu donas bonan superrigardon pri la personeco kaj agado de la gvidinto de la bulgaraj partio kaj ŝtato. Ni trovas plue en la volumeto eseon pri la humanisto Zamenhof, pri la celo kaj agado de MEM, kies longjara prezidinto (15 jaroj) kaj nuna honora prezidanto Aleksiev estas. Bonvenas la skizoj pri la fondinto de MEM, la histpano Anton Balague, pri la terore persekutita Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BuLEA), kies kunfondinto kaj unua sekretario Nikola Aleksiev estis, kaj pri Nikola Šopov, aktiva BuLEA-ano kaj viktimo de la germanaj kaj bulgaraj faŝistoj. Nikola Aleksiev estas nuntempulo kaj samtempe historia figuro.
Tion, kion li priskribas, li mem travivis. Do aŭtentika valora materialo. Eta manko de la broŝuro estas la malzorge kunmetita bibliografio de la verkoj de la aŭtoro. Mankas eldonloko, eldonejo, paĝonombro. Krome, bulgarlingvajn verkojn oni citu bulgarlingve kaj donu en krampoj esperantigon de la titoloj. Entute, tre bonvena verketo de unu el la plej rimarkindaj personuloj de la nuntempa Esperanto-movado.

D. Blanke

# KORESPONDDEZIROJ 31 6 35

## Pollando

**Komencantoj dez. kor.:**

— Piotr Laprus, ul. Młynarska 20 m 11, **08-110 Siedlce,** 18j.
— Gregor Domanski, ul. Sienkiewicza 31 m 29, **08-110 Siedlce,** 18j.
— Dorota Maczka, ul. Młynarska 22/28, **08-110 Siedlice,** 21j.

Stanislav Debski, str. Glowna 55, **97-122 Rozyca,** 21j., dez. kor. pri literaturo, filozofio, fotografio, turismo
Lernanto, 12j., dez. kor., kol. bk.: Marcin Podedworny, ul. Pocieszka 12/58 **25-519 Kielce**
Eugeniusz Piasecki, ul. j. Matejki 2, **67400 Wschowa,** dez. kor. k. interŝ. pm
Instruistino, 39j., dez. kor. tutmonde pri turismo, astrologio, muziko: Bożenna Ślezak, **90-368 Łodź,** ul. Piotrkowska 182 m 505
Oficistino, 24j., dez. kor. tutmonde pri libroj, turismo, filatelio: Małgorzata Gvomelska, ul. Sporna 78/15, **91-702 Łodź**
Komencanto, 31j. oficisto, dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo kol. bk: Zdzisław Kulczycki, ul. Kośielna 8a m 3, **68-130 Gozolnica**
38j. presisto dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, folkloro: Zbigniew Olczak, **99-100 Łeczyca,** str. Łakowa 26 m 61
Lucjan Łopucki, **20-007 Lublin,** ul. Pstrowskiego 4/6, 39j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. pm, bk
Daniel Checko, **68-200 Zary,** str. St. Balorego 2, dez. kor. tutmonde, kol. bk
19j. lernanto dez. kor. tutmonde pri turismo, sporto, kol. pm: Krzysztof Blatkiewicz, Ściechówek 13, **74-307 Ściechów**
14j. lernanto dez. kor. tutmonde pri turismo, muziko, vivo en aliaj landoj, kol. pm, bk: Michał Rudziecki, **Warszawa 04-030,** str. Kinowa 25 m, 279
Gelernantoj dez. kor.
— Kamilo Kwiatkowski, **15-143 Bialostoko,** str. Putkowa 9 m 54, 8j., kol. pm, bk
— Dorota, Leszewicz, **16-030 Suprasilo,** k/Bialystok, str. Kościuszki 19, 16j. pri muziko kaj turismo
— Roberto Fraczek, **16-030 Suprasilo** k/Bialystok, str. Kościuszki 19, 16j., sporto, moderna muziko
— Ania Nosko, **16-030 Suprasilo,** k/Bialystok, str. Kościuszki 19, 14j., pri moderna muziko, sporto
— Agata Prymala, **16-030 Suprasilo,** str. Kościuszki 19, 14j., pri moderna muziko

Juĝisto, 42j., dez. kor. p. ĉ. t., kol. bk, pm: Antoni Myszakowski skr. poczt. 26, **56-400 Olesnica**
25j. laboristo dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, sporto, kol. bk: Arkadiusz Gała, **58-420 Lubawka,** str. Kościuski 4/3
Studentino, 21j., dez. kor. tutmonde pri muziko, geografio, naturo, kol. bk, pm: Grazyna Markiewicz, ul. Galczynskiego 18/5, **85-322 Bydgoszcz**

Komencantino, 23j. instruistino, dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, muziko: kol. bk, flagetojn, prospektojn: Nina Zdunkiewicz, ul. Farna 10, **99-417 Bolimów,** woj. Skierniewskie

Komencantino, 27j., inĝenierino, dez. kor. tutmonde pri turismo, kol. turismajn prospektojn, fotoalbumojn: Grazyna Kapica, str. Rogowska 94/5, **54-440 Wroclaw**
Elzbieta Kosik, ul. J. Krasickiego 3, **22-500 Hrubieszow,** 26j., dez. kor. tutmonde pri vojaĝoj, literaturo, historio, kol. esperantajojn, bk, pm

Komencanto, 19j., dez. kor. tutmonde pri literaturo, historio, sporto: Leszek Jachnik, **PL-63-205 Slawoszew,** woj. Kaliskie
Komencantino, 20j., dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, folkloro, kol. pm: Agata Kośmider, **59-220 Legnica,** str. Rzemieslnicza 2/15

Komencanto, 30j., ekonomisto dez. kor. tutmonde; Eugeniusz Budka, Al. Powst. Wielkop 40/54, **85-090 Bydgoszcz**

Studento, 20j., dez. kor. tutmonde pri literaturo, turismo, filmo, geografio, muziko, sporto, biologio: Jarek Wyrozebski, Urocza 1/29, **11-400 K0etrzyn**

Ekonomisto, 35j., dez. kor. kun geesp. el GDR pri E-movado, vivmanieroj, historio, turismo, sporto, vojaĝoj, kol. bk: Ryszard Djakow, **41-902 Bytom,** Pl. Woj. Polskiego 7/67

Komencanto, 32j. muzikisto, dez. kor. tutmondė pri turismo, sporto, fotografio, kol. bk, turismajn prospektojn: Wiesław Michalik, **87-100 Torun,** str. Licealna 50

18j. lernanto dez. kor. kun esp. el GDR pri lingvoj, muziko, geografio: Sławomir Majkowski, ul. Ogvodowa 27, **11-706 Rybno,** woj. Olsztyńskie

11j. komencanto dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. pm: Łukasz Uniejewski, str. Opolska 8/26, **44-335 Jastrzebie**

26j. teknikisto dez. kor. tutmonde pri turismo, muziko, geografio, kol. bk, pm, sondiskojn: Andrzej Butkiewicz, Jasionowo, **16-411 Szypliszki**

Roman Michalik, Witoszów, Dol. **58-100 Świdnica,** 17j., dez. kor. kun junaj esp. el GDR pri turismo, Esperanto, muziko

Fraŭlino 25j., komencantino dez. kor. tutmonde: Grażyna Urban, **08-110 Siedlce,** ul. Chrobrego 6/54

21j. oficistino dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, kino, teatro: Alicja Różek, ul. 31 Stycznia 44/43, **89-600 Chojnice**

Esperanto-Klubo „Amuzo" dez. havi kontaktojn kun E-kluboj el GDR, skribu al Ryszard Stempien, str. C. Sklodowskiej 9, **59-840 Zawidów**

Janina Trojan, **93-322 Łodź,** ul. Mieszczanska 15/27, 38j., dez. kor. kun geesp. el GDR, kol. pm, bk, turismajn prospektojn

Komencantoj dez. kor. tutmonde pri literaturo, poezio, arto, muziko, fotografio, amikeco:

— Lidia Wasat, ul. Kaliskiego 1/12, **44-100 Gliwice, 28j.**
— Urszula Tatrzanska, Aleja Majowa 4/66, **44-100 Gliwice,** 37j.
— Andrzej Tyca, ul. Przyazlości 8/1, **44-119 Gliwice,** 26j.

Komencanto, 32j., dez. kor. pri turismo, radioelektroniko, kuracherboj, filatelio, kol. pm: Henryk Krakowski, str. 22 lipca 32d/55, **67-120 Kozuchów**

Komencantino, 22j., dez. kor. tutmonde pri literaturo, turismo, kol. bk, pm: Izabela Cieluch, **57-350 Kudowa-Zdr.,** ul. Swierczewskiego 3/1

Katarzyna Bald, ul. Boczna 3a/13, **67-400 Wschowa,** woj. Leszczyńskie, 14j., dez. kor. tutmonde pri muziko, kol. pm, bk

Edyta Predecka, ul. Boczna 3a/19, **67-400 Wschowa,** woj. Leszczyńskie, 12j., dez. kor. tutmonde pri muziko, kol. pm, bk

Letervesperon organizas Esperanto-Klubo novembre 1986. Ĉiuj leteroj kaj bk estos respondota. Skribu al: Esperanto-Klubo SDK, Parkowa 6, **28-200 Staszów.**

24j. elektronikisto dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk, sondiskojn: Andrzej Zejdler, ul. Stołeczna 14 „C"/49, **15-879 Białystok**

## Soveta Unio

Vladimir Belajev, Abon. Jaŝĉik 29, **357 600 Essentuki,** dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.

28j. pianinstruisto dez. kor. kun germanaj k aŭstraj s-anoj pri klasika muziko, kol. bk, diskojn, notojn: Sergej Grohotov, Frunzenskaja naber. 12-36, **119 021 Moskvo**

Litovaj esperantistoj dez. kor.:

— Vincenta Gustaite, **235 700 Kretinga,** Pasieniečiu 8-3, apotekistino
— Sigita Kapustaite, **235 720 Palanga,** Sauletekio 2-12, flegistino
— Danute Zubyte, **235 720 Palanga,** Sauletekio 3-1, instruistino
— Rima Markaityte, **235 720 Palanga,** J. Janonio 32-9, flegistino
— Lina Maĉiulyte, **235 720 Palanga,** Birutes 1, lernantino 10a klaso
— Saule Šinkunaite, **235 720 Palanga,** Jurates 14, lernantino 9a klaso

Irina Rudenko, Sovetskaja ul. 141, **416 500 Kapustin Jar,** Astrahanski reg., dez. kor. p. ĉ. t. tutmonde, kol. pm

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16